

V - 4252 / 1988

1988 januaro *brevu!*

81a jaro

n-ro 985 (1)




aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun un kaj unesko)

sidejo: nieuwe binnenweg 176 • 3015 bj rotterdam • nederlando



Kial UEA ne fondiĝis jam en 1905?

Ludovikito pri la kvereloj ĉirkaŭ la zamenhofa Ligo

Vi trovos,

ke 1987 ne estis vojaĝocelo sed deirpunkto, direkte al novaj kaj helaj horizontoj. Tiel la Prezidanto kaj Ĝenerala Direktoro de UEA, kiuj ambaŭ salutas la novan jaron en la sekvaj paĝoj per vortoj esperoplenaj kaj laborinstigaj. La saman efikon ja celas (kiel ĉiam!) la cetero de ĉi tiu numero — aparte la artikolaro el Helsinki, kies nekutima emfazo pri per- kaj ne por-Esperanta agado espereble trovos reeĥon ĉe niaj aktivuloj. Provu anstataŭigi la vorton "pacmovado" per "Esperanto-movado", kaj eltrovu mem kiom valoras por ni la spertoj kaj ideoj el tiu alia medio.

Unu tagon antaŭ la enpresejigo de ĉi tiu numero venis la informo sur la tria paĝo. Nia oficeja Zamenhof-Tago tute funebriĝis pro tio: ĉar prof. Lapenna nedisigeble, poreterne ligis sian spiriton kun la afero de Esperanto. Indan omaĝon ni provos aperigi februare, sed la nuna malĝojo ebligas diri nur: Pacon al lia memoro.

Enhavo

- 1 Novjara mesaĝo de la Prezidanto de UEA: 1988 daŭrigu la atingojn de elstara 1987 (Humphrey Tonkin)
- 2 Centjara Jubileo de Esperanto: Komenciĝis la jubilea jarcento! (Simo Milojević)
- 3 Okdek jaroj de UEA: Alvoko al vasta diskuto pri nia tutmonda organizaĵo (Mark Fettes)
- 4 Plena verkaro de Zamenhof: Dek kvin jaroj de la PVZ alportas aŭtoran jubileon (Gerrit Berveling); Kial la organiza projekto de Ludoviko fiaskis antaŭ la bulonja kongreso? (Ludovikito); *Postrikolto de ludovikaĵoj* (William Auld); *Post la iel-tiela kompletigo* (Ryszard Rokicki); *Ludovikologiaj biografietoj* (W.A. Verloren van Themaat)
- 9 Paco kaj Esperanto — Interrilatoj (referaĵoj el la komuna simpozio inter UEA kaj Monda Pac-Konsilio): Oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo (Humphrey Tonkin); Nur per kunlaboro ni antaŭeniros (Romesh Chandra); Konstrui la pacon sen timi tiklajn demandojn (Jan Koszmaluk); Ni bezonas la lingvon de la junularo (Nina Baldvinsdottir); Por nova komunika ordo en la internacia pacmovado (Mark Fettes); Nova maniero pensi, nova maniero agi (Marilyn Olsson)
- 15 Reagoj: Strategiaj celoj por Bjalistoko (Mila v.d. Horst-Kolinska); Atenco kontraŭ ekologio (Wolfgang Gunther); Librofoiroj meritas pli da atenco (J.S. Skorupski; Eŭgeno S. Perevertajlo)
- 16 Junularo: TEJO jubileos en Jugoslavio (Ankica Jagnjić)
Kalendaro (internacia aranĝoj ĝis aprilo 1988)
- 17 Loke—Fake—Persone (mallongaj novaĵoj)
- 19 Anoncetoj
- 20 Esperanto en radio (tabelo de internaciaj elsendoj)

La kovrilo

atentigas samtempe kaj iom oblikve pri du pliaj jubileoj, kiuj aperas ĉi-numere (eĉ sen paroli pri Jubilea Jardeko, reklamita sur p.2!). La okdekjariĝo de UEA ŝajnas vere mirakla, kiam oni tralegas la artikolon de Ludovikito (p.5-8) kaj konstatas, kiel privataj ĵaluzoj kaj personaj konfliktoj kapablas pereigi ĉiun organizan inciaton. Kovrile, la vizaĝoj de (laŭhorloĝe de la maldekstra mezo) Bourlet, Cart, de Beaufront, Fruictier, Zamenhof kaj Michaux memorigas pri la malfaciloj realigi universalan asocion.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910); **establita** kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920). **Legata** en 105 landoj. **Voĉlegata** por blinduloj.

Redaktoro: Mark Fettes.

Abonprezo: varias laŭlande (gld. 44,50; US\$ 21; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉisuba adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperantomovado rajtas rabaton de 50%. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Adreso de UEA: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 436 10 44 kaj 436 15 39.

Telekso: 23721 uea nl.

Telegramoj: ESPERANTO ROTTERDAM.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804). **Nederlanda poŝta ĝirkonto:** 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto (planado, Jubileo): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; tel. (315) 265-6744; telekso (5) 9103500242 ud.

Vicprezidanto (Gvidas eksteran agadon): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge, Belgio; tel. (50) 35 49 35

Vicprezidanto (interna kaj ekstera agadoj): s-ro Yosimi Umeda, 2-15-10 Aobadai, Meguro-ku, Tōkyō, 153, Jap.; tel. (3) 770 64 86; telekso 02655177 eki j.

Ĝenerala sekretario (interna agado): d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u 5/b VII.22, H-7624 Pécs, Hungario; tel. (72) 23 274.

Estrarano (ekstera agado): d-rino Barbara Despiney, 21 rue des Cuverons, F-92220 Bagneux, Fr.; tel. (1) 46 65 22 16.

Estrarano (financoj): s-ro Gian Carlo Fighiera, Juan Ramón Jiménez 28, 6ºA, E-28036 Madrid, Hispanio; tel. 250 39 87.

Estrarano (ekstera agado): prof. d-ro Ottó Haszpra, Rosenberg házaspár u. 5, H-1054 Budapest, Hung.; tel. (1) 316 423; telekso 225931 megy h.

Estrarano (interna agado): s-ro Diccon Masterman, "Quasi in Cima", Via di Cecina 610, I-55029 S. Stefano di Moriano (LU), Italio; tel. (583) 570 66.

Estrarano (interna agado): s-ro Jean-Louis Texier, 27 chemin des Carreaux, Cerny, F-91590 La Ferté Alais, Francio; tel. (1) 64 57 66 53.

1988 daŭrigu la atingojn de elstara 1987

Kiel ajn oni konsideras, la jaro 1987 estis elstara jaro por Esperanto. Tra la tuta mondo, ene de lokaj grupoj kaj landaj asocioj oni digne festis la centjariĝon per specialaj publikaj kunvenoj, jubileaj kongresoj, eldonaĵoj kaj, plej grave, informa laboro. La kvanto de artikoloj pri Esperanto, kiuj aperis tra la mondo, estis senprecedence alta, kaj la atento, kiun ĝi ricevis ĉe la publiko kaj la formantoj de la publika opinio estis pozitiva kaj impona.

La historio de la Jubileo vere komenciĝis en 1985, kiam la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis rezolucion favoran al Esperanto, precipe dank' al la energia laboro de nia kolego Tibor Sekelj. Ĝi iasence kulminis en Varsovio en julio, kiam sesmil homoj el ĉiuj mondopartoj kolektiĝis en la plej granda kunveno de parolantoj de Esperanto en la tuta historio de la lingvo.

Jubilea prezidanta tosto en Varsovio.



La laboro daŭras. Dum la venontaj monatoj aperos ĉe UEA tuta lavango da eldonaĵoj. Okazos la unua kunsido de la organiza komitato de la Centro Zamenhof en Bjalistoko. En pluraj landoj oni planas agadojn ligitajn al la Jubileo, kiuj tamen okazos en la venontaj monatoj. Efektive, oni devas atenti, ke la jaro 1988 ne estu jaro de ripozo, ke la granda rapidiĝo kaj intensiĝo de nia agado en 1987 reprezentu ne izolitan kuliminon, sed novan ŝtupon en nia progreso.

La Estraro de UEA, aŭdinte raportojn pri la imponaj sukcesoj kunlige kun la Jubileo en 1987, lastatempe decidis formale fermi la Jubileon per speciala ceremonio dum la Universala Kongreso en Roterdamo. Intertempe UEA daŭrigos la jubilean agadon — tiel ke nia jubilea periodo daŭros ĝis la oficiala fermo en julio. Ni alvokas al ĉiuj organizaĵoj ligitaj al UEA, kaj al ĉiuj aliaj Esperanto-organizaĵoj, daŭrigi la laboron, kaj eĉ plani novajn agadojn, por la Jubileo 1987-88.

Mi kredas, ke mi esprimas la dankemon de ĉiuj niaj kolegoj se mi kvazaŭ formale dankas tiujn, kiuj per tiel granda fortostreĉo progresigis nian movadon en 1987. La jaro 1988 estu jaro de daŭrigo kaj de novaj atingoj. La jubileo pluprogresu. Al ĉiuj anoj de nia Asocio kaj al ĉiuj kunlaborantoj, mi deziras fruktodonan, prosperan kaj pacan novan jaron, dum kiu ni starigu novajn komunikajn pontojn inter la homoj per la Internacia Lingvo Esperanto.

Humphrey Tonkin

ZAMENHOF-PREMIO 1987 AL UNICEF-DIREKTORO

James P. Grant, ekde 1980 la Ĝenerala Direktoro de la Infan-Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj (UNICEF), fariĝis la tria ricevinto de la Premio Zamenhof por Internacia Kompreniĝo en ceremonio la 11-an de decembro en Novjorko, Usono.

D-ro Grant plenumis gravajn postenojn en la usona registaro kaj en diversaj fakoj de UN, speciale koncerne internacian evoluhelpon. La organizaĵo kiun li nun gvidas, UNICEF, estas vaste estimata pro siaj klopodoj plibonigi la sano-, nutro- kaj edukostaton de infanoj tra la mondo: laboro, kiu interalie gajnis por ĝi la Nobelpremion por paco en 1965.

La Premio Zamenhof estis kreita de UEA en 1985, kun la celo rekoni kaj subteni homojn, kiuj notinde kontribuis al la afero de internacia kompreniĝo kaj al realigo de la idealoj de la aŭtoro de Esperanto. Ĝis nun ricevis ĝin ankaŭ Robert Muller, asista ĝenerala sekretario de UN, kaj Amadou Mahtar M' Bow, ĝenerala direktoro de Unesko.

Komenciĝis la jubilea jardeko!

Ĉiuj jubileoj estas siaspeca mezurilo. Ankaŭ la nia estas tio. Tra la pasinta jaro, ni kaj aliaj provis mezuri, kiom altas la zamenhofa lingvo post la unuaj cent jaroj de sia ekzisto, kiom ĝi pezas en la hodiaŭa mondo, kiom da decibeloj da bruoj ĝi kapablas fari, kiom da omoj da rezisto ĝi ankoraŭ renkontas... Kaj tiu mezurado, kian rikolton ĝi portis? Kian instruon ĝi donas? Kian direkton por nia estonta laboro ĝi montras?

Se rigardi objekte (kiel ajn tio malfacilas en la interno de la Movado), ni devus esti kontentaj pri niaj atingoj sur la diversaj kampoj de la movada laboro. Eĉ se niaj rezultoj ne atingas montpintojn, ili ja havas sian alton kaj ne kuŝas plu en senreliefa plataĵo kun la polvo. Eĉ se ni ne ankoraŭ havas la pezon, kiu tirus la mondon al nia flanko de la pesilo, ni ja posedas ĝin kaj ne plu estas simpla muŝo, kiu klopodas kontraŭpezi la terglobo. Eĉ se ni ne sukcesis krei surdigan bruon pri nia Jubileo, iom da ĝi ni ja kreis, kaj la mondaj amaskomunikiloj dediĉis tra la pasinta jaro pli da atento al Esperanto ol ili faris dum pluraj antaŭaj jardekoj kune. Verdire, eble nia ĉefa atingo rilate la Jubileon estas la fakto, ke la ĵurnalistoj de la plej gravaj



gazetoj, revuoj, radio- kaj televid-stacioj pli postkuris nin ol ni ĉasis ilin. Se kelkaj el ili tion ne faris, tio fariĝis pli ilia problemo ol nia, ĉar ni multilate kaj en multaj landoj apartenis al la novaĵoj (aŭ la jubileoj) de la jaro.

Kiam antaŭ kelkaj jaroj UEA faris siajn planojn por la Jubilea Jaro, kiam ĝi instigis la aliajn movadajn instancojn fari simile, kiam ĝi klopodis kunordigi la diversajn jubileajn agadojn — ĝi eble estis tro ambicia. Ĉu tio estis

eraro? Ĉu ĝi estas peko? Ni dirus, ke temas nek pri eraro nek pri peko. Feliĉe, ke ni ĉiuj restas ambiciaj, ke ni celas pli alten ol ni povas atingi, ke ni planas foje pli ol ni povas fari. Ambicio devas resti nia ĉefa motoro, ĉar ĝi ĉiam estis la ĉefa spronilo de la movadoj, kiuj volas ŝanĝi la mondon eĉ se nur sur difinita kampo de la homa vivo.

En tiuj niaj jubileaj planoj troviĝis ero pri la kreo de impona listo de Internacia Patrona Komitato por la Centjara Jubileo. Ĉar nenie publike aperis definitiva listo de tiu Komitato, pluraj demandas sin pri ĝia ekzisto kaj kion UEA intencas fari pri ĝi. Jes ja, la listo ekzistas, kaj jen la plej elstaraj nomoj el ĝi: Lia Reĝa Moŝto Juan Carlos (Hispanio), Vigdís Finnbogadóttir (prezidento de Islando), Ingemund Bengtsson (prezidanto de Sveda Parlamento), Willem Drees (multjara ĉefministro de Nederlando), Roman Malinowski (prezidanto de Pola Parlamento), Józef Cyrankiewicz (antaŭa ĉefministro de Pollando), Amintore Fanfani, Bettino Craxi, Giulio Andreotti (antaŭaj ĉefministroj de Italio), Ludoviko Ch. Zaleski-Zamenhof (nepo de la kreinto de Esperanto), Péter Várkonyi (ministro pri eksteraj aferoj de Hungario), Sándor Gáspár (prezidanto de Monda Federacio de Sindikatoj), Luciano Pavarotti (mondfama itala operkantisto), Montserrat Caballé (mondrenoma soprano), Aureliano Oreja (prezidanto de Eŭropa Konsilio), Amadou Mahtar M'Bow (antaŭa ĝenerala direktoro de Unesko), Bakin (mondfama ĉina verkisto), H. Lionel Elvin (estinta edukdirektoro en Unesko kaj en la Londona Universitato), Tadao Umesao (mondrenoma japana etnologo)... La Komitaton enestas plia aro da eminentuloj el pluraj landoj kaj vivosferoj. Fakte, la subskribinto de ĉi tiu teksto havas estraran komision plukompletigadi la Komitaton, por aperigi ĝian plenan liston en la *Jubilea libro*, kiu eldoniĝos antaŭ la 73a Universala Kongreso en Roterdamo.

Tiu *Jubilea libro* (provizora labortitolo) provos esti antologio de la plej valoraj tekstoj jam aperintaj pri la 100-

AKUPUNKTURA KURSO EN ESPERANTO

La Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj decidis organizi akupunktur-kurson instrui kaj praktigi ĝin en Esperanto.

Tempo: 07.16-08.08, 1988 (ĝuste antaŭ la 2-a Internacia Akademio Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en Esperanto, organizata de la Ĉina Akademio de Sciencoj, t.e. 08.10-16, 1988)

Loko: en Pekino, Ĉinio

Lernopago: 500 usonaj dolaroj

Loĝejopago: 200 usonaj dolaroj

Por aliĝi, skribu al: s-ino Wang Yuchun,
Esperanto-Asocio, Akademio Sinica, 52 Sanlihe,
Beijing, Ĉinio.

La 15an de decembro 1987
forpasis en Kopenhago, Danlando

prof. d-ro Ivo Lapenna

la plej granda movada organizanto
en la historio de la Internacia Lingvo.

Nekrologo aperos
en nia februara numero.

jara disvolviĝo de Esperanto. Pluraj kontribuoj en tiu festa volumo estos ankaŭ tute novaj, ĉar la libro ambicios esti kiel eble plej kompleta bildo de la unua jarcento de Esperanto. Ni planas riĉe ilustrati la verkon, tiel ke ĝi fariĝu iaspeca fotohistorio de la pasintaj cent jaroj de la Internacia Lingvo. Kompreneble, la volumo aperos en adekvata festa vesto. Simile estas pri la Jubilea Kolekto 'Jarcento de Esperanto', kies pliaj volumoj aperos dum la venontaj unu-du jaroj.

Vi jam legis en tiu ĉi revuo, ke la Estraro de UEA decidis oficiale longigi la Jubilean Jaron ĝis la 26a de julio 1988 (datreveno de la Unua Libro), tiel ke la jubileaj festoj solene finiĝu dum la Kongreso en Roterdamo. Ni tiam ĉesos jubili pro la centjariĝo sed ni ne ĉesos jubilei, t.e. jubilee kaj ambicie plulabori. Se ni en 1987/88 festis kaj festos la centan datrevenon de la Internacia Lingvo, en 1988 ni devus aparte festi la centjariĝon de la Esperanto-movado, ĉar la unua E-societo kreiĝis en 1988 en Nurenburgo (Germanio). En 1989 ni povos festi la centan datrevenon de la Esperanta gazetaro, ĉar *La esperantisto* ekaperis en 1889... Ne mankos al ni centjaraj jubileoj, ili nur komenciĝis kaj ekde nun ĉiujare estos io prifestinda, io por jubilee agadi, por antaŭenigi nian komunan laboron.

Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko ĵus proklamis, ke la jaroj 1988-1997 estas Monda Jardeko por Kultura Evoluigo. Ni aliĝu al tiu jardeko, ĉar ĝi perfekte taŭgas kiel ekstera kadro de nia propra Jubilea Jardeko. Ni ja estas tiuj, kiuj profunde konscias, kiel gigantan kontribuon povus fari al tiu Monda Jardeko — kaj al la tuta estonta historio de la homaro — serioza atento al la Internacia Lingvo. Se oni tiel vaste prinotis nian ekziston (ankaŭ tio estas atingo!) dum la Jubilea Jaro, ni plulaboru tiel ke la mondo plene konsciiĝu pri la potencialoj kaj la solvo, kiujn la Internacia Lingvo akiris kaj proponas. Nia Jubilea Jardeko ĵus komenciĝis!

Simo Milojević

*Antaŭdankon
por la frua pago
de via kotizo
por la jaro 1988*

OKDEK JAROJ DE UEA

Alvoko al vasta diskuto pri nia tutmonda organizaĵo

Universala Esperanto-Asocio oficiale fondiĝis la 28an de aprilo 1908. Datreveno evidente malpli grava, ol la centjara jubileo de Esperanto! Sed okdekjariĝo estas inter la plej multe festataj jubileoj, kaj tiu ĉi ja meritas atenton: ĉar la kreskanta tutmondiĝo de la Movado donas al UEA pli kaj pli esencan rolon. Esperanto antaŭeniras parte per aŭ pro si mem; sed la rapido kaj direkto de tiu kresko dependas grandparte de la gvidado kaj efikeco de la tegmentita organizaĵo de la esperantistoj.

La kompletigon de ties oka jardeko ni do intencas festi tra ĉi tiu jarkolekto, per paĝabundo diversspeca kaj diverscela, de la historio de la Asocio tra ĝiaj celoj, strukturo, fortoj kaj malfortoj, cele al larĝa diskuto pri ĝia evoluo en la proksima estonteco. Kritikantoj de UEA ne malabundas, sed estas pli malfacile fari pozitivajn, konkretajn kaj realigeblajn proponojn por plibonigo. Ĝuste al tio ni invitas vin. Inter la eble diskutindaj temoj estas la jenaj:

- * Kiel oni povus plilarĝigi la financon bazon de UEA, preter la dependeco je membrokotizoj kaj donacoj?
- * Kiuj ŝanĝoj en la Universalaj Kongresoj povus doni maksimuman helpon al la Movado kaj la UEA?
- * Kiom ni povas atendi de filiaj oficejoj — ekz. en Novjorko, Budapeŝto, Tokio, Pekino? Ĉu ili valoros la investon?
- * Ĉu estas tasko de UEA okupiĝi pri eldonado, kaj se jes, kion ĝi celu eldoni?
- * Kiom el niaj rimedoj ni dediĉu al interrilatoj kun UN, Unesko kaj aliaj internaciaj organizaĵoj?
- * Kiel ni povus pliekifigi kaj plidemokratiigi la strukturon de la Asocio, aparte koncerne la Komitaton?
- * Ĉu eblas trovi strategion por eviti la ripetajn krizojn de malfunkciado en la Sidejo kaj maltroo de efikaj gvidantoj en la Komitato-Estraro?

Ĉi tiuj demandoj evidente ne estas bagatelaj. Fakte, ili estas esence fakaj, por kies respondo oni bezonas scion kaj sperton pri similaj problemoj en similaj organizaĵoj (ĉar ni ne trompu nin kredante, ke UEA estas unika!). Tial, ajna diskuto certe ne surpaŝigos portpretajn solvojn; sed ĝi ja povos fokusigi atenton je la ekzisto de problemoj kaj de neeluzataj ŝancoj, kaj difini eblajn vojojn al ilia forigo, respektive kapto. Nur larĝa diskuto, malfermita al ĉiuj, povos profiti de la plena forto de nia Movado.

Ni do provos regule aperi artikol(et)ojn tra la venontaj numeroj, kiuj prezentos ideojn kaj proponojn koncerne la strukturon kaj agadon de UEA. Ili celos esti nur bazo por la kontribuoj de aliaj, aparte de tiuj kun scioj financaj, organizaj, administraj, juraj — kaj pri UEA mem. Tamen ni substreku, ke ĉies reagoj estos bonvenaj! Unu evidenta fokuso de la debato estos la nova Laborplano de UEA, pretigata ĉi-jare por adopto en Roterdamo (kie, cetere, ni planas specialan programon koncerne la agadon de UEA). La antaŭa Laborplano troveblas en *Esperanto* 1983/p.181, kaj ni volonte disponigos fotokopion al tiuj, kiuj ne havas tiun numeron ĉemane.

Nia ĉi-numera reagaro, sur p.15, estu nur la Malfermo!

Mark Fettes

Dek kvin jaroj de la PVZ alportas aŭtoran jubileon

En tiu ĉi monato s-ro itô kanzi (jes, sen majusklo!) fariĝas 70-jara. Eble por pluraj el niaj gelegantoj tiu nomo ne estas konata. Sed se mi mencias "Ludovikito", la eldoniston de la PVZ (*Plena verkaro de Zamenhof*), tiam la afero ŝanĝiĝas. Fakte temas pri unu el la plej lerte kaj sencplene trovitaj pseŭdonimoj, kiujn mi konas: kombino de du nomoj (Ludoviko Zamenhof kaj itô kanzi) kaj samtempe vortluda aludo pri la viv-inspiro de Ludovikito, kvazaŭ temus pri (nekuracebla?) malsano. — Kaj kiom mi konas lin, li ne dezirus saniĝi je tio.

PVZ estas giganta entrepreno, certe por unuopulo. Tamen, itô kanzi ĝin kuraĝis. PVZ — kiam preta — devos konsisti el tri serioj da libroj. La baza parto ampleksas la originalaĵojn de Zamenhof: ekde leteroj, poŝtkartoj, poemoj ĝis artikoloj kaj paroladoj; ĉion akompanas kutime ĉarma komentado postparola. Volumo 10 *Postrikolto de ludovikaĵoj* finis la parton unuan. Kelkaj "bis-aj" kajeroj ankoraŭ celas trempi la legantaron en la koncernajn problemojn aŭ, senplie, en la tiutempan etoson: *La inkunabloj de Esperanto*, *La neforgeseblaj kongresoj* jam aperis.

Antaŭnelonge aperis duaeldone la libro *Unuaj libroj por esperantistoj*. Ĝia unua eldono, bele bindita, luksaspekta, aperis en 1973 ĉe senadresa (ho ve!) eldonejo Ludovikito kun la indiko "iam kompletigota plena verkaro de l.l. zamenhof — kajero 1". La vorto *kajero* estis malorgojla rilate la 157 paĝojn.

Inter ambaŭ eldonoj la diferencoj markas filologian maturiĝon. Hauptenthal kritikis recenze la diletantismon de l'unua eldono (*Esperanto* 1973/p.195, represita en *Post la iel-tiela kompletigo*), sed nun itô kanzi jam estas grava fakulo.

Kelkaj el la diferencoj estas jenaj: nun la publiko povas konsulti la vere plej praan "vort,ar,o,n" kiu akompanis la unuan eldonon de l'UL-r (Unua Libro por Rusoj); origine, itô kanzi reproduktis postan eldonon. Nun oni do povas proprokule konstati, ke "Esperanto" (la pseŭdonimo de Zamenhof en 1887) ne devenis de la esperanta verbo *esper*i, ĉar tiu verbo tiutempe aspektis *sper*i! La ceterajn ŝanĝiĝojn oni mem konstatu! Krome nun aldoniĝas reprodukto de la origina ruslingva kovrilpaĝo de l'UL-r. Sed plej bonvena por la ĝenerala publiko estas verŝajne, ke de nun oni povas legi multe pli fluan tradukon de la tria ĉapitro de l'UL (trad. Prof. Waringhien). Nove aldonitaj paĝoj (115-a ĝis d) klarigas pri la kialoj de la ŝanĝoj.

La tradukaĵoj zamenhofaj konsistigos la parton duan: aperis la tekstoj el 1887-1903. Tiu ĉi parto ampleksos eĉ (kaj tio estas por filologoj nepre gravega oportuno) la kompletan tradukon de Zamenhof el la Malnova Testamento (*De Josuo al Jeremia* kaj *De Jeĥezkel al Malaĥi*); ĉar ĝis nun oni povis citi zamenhofaĵojn el la Biblio nur kun certa hezito: kio ja fakte estas lia, kio estas konside-

renda kiel ŝanĝo de la pastra komitato kiu prespretigis la Biblion? (PIV sekve uzas por la bibliaj citaĵoj specialan signon.)


La parto tria konsistos el t.n. "kromkajeroj". Aperis ĝis nun *Senlegenda biografio de l.l. zamenhof*, *Korespondaĵo ludovikologia* kaj *Post la iel-tiela kompletigo*. Tiuj ĉi lastaj estas en la filologio, miascie, unikaj. Ili prezentas (parton el) la korespondaĵo de Ludovikito kun kelkaj el liaj "kondukantoj", speciale s-roj Maimon kaj Waringhien. Kaj per tio ili atestas pri la labormetodo ĉe la kompilado de PVZ, ĉe la verkado de la *Senlegenda biografio*, pri la problemoj frontitaj kaj la eblaj solvopropoj, eĉ se sen sukcesaj. Tio ĉi ĉe editoritaj tekstoj de nacilingvaj aŭtoroj kutime plene mankas. Krome jam aperis *Ludovikologiaj biografietoj*; tiu ĉi kromkajero ne nur prezentas buntan amason da rememoroj k.s. pri Zamenhof, sed same legigas al ni la voĉojn de veteranoj pri si mem; la libron 336-paĝan finas represo de du "inkunabloj", *La neĝa blovado* kaj *La gefratoj*, ambaŭ de Grabowski.

Por nova generacio de esperantistoj povas esti ege utile, ekkoni tiujn ĉi malnovajn tekstojn. Nacilingva literaturo, nacilingva evoluo disvolviĝas surbaze de komune uzata kultura heredaĵo; pri Esperanto principe validas la samo — sed kun la granda diferenco, ke ĉiu generacio devas alproprigi al si la heredaĵon multe pli konscie, multe pli intence. Ĉar nin ne ĉirkaŭas ekde naskiĝo la internacia kulturo je la sama maniero, kiel nin ĉirkaŭas la nacilingva.

Pri s-ro itô kanzi mem mi povas aldoni ne multe. Mi ne volas tro malkaŝi personajn leterojn kiujn li bonvolis sendi al mi. Estus ne digne. Kiel mi jam konstatis, li ŝajne ne timis entrepreni ion grandiozan: simple, kie sian taskon li vidis, tie li komencis. Parenteze, anticipu li jam verkis romanegon en ok volumegoj en la japana lingvo pri Zamenhof. Do, kiel dirite: grandajn entreprenojn li ne timis. Kaj per sia obstino kaj eltrovemo li sciis kunlaborigi plurajn kompetentajn homojn en sia projekto. Mi jam menciis kelkajn; ankaŭ s-ro Hauptenthal ege valore kontribuis, same faris multaj aliaj, sed mi ne kapablas mencii ĉiujn. Do prefere neniun plu.

Per siaj leteroj s-ro itô kanzi scias treege lerte vortumi demandojn pri plej etaj detaloj, kiuj restas ankoraŭ solvotaj rilate la vivon aŭ la eldonagadon de Zamenhof aŭ rilate la disvolviĝon de Esperanto. Tiel mirinde li scias vortumi siajn demandojn, ke preskaŭ ne eblas prokrasti ekserĉon de la respondo por sendi ĝin al li. Fakte, en la daŭro de kelkaj jaroj li fariĝis al mi kvazaŭ persona amiko, kies perletera ĉeesto ofte scias forlogi min en la pasintecon por kune enprofundiĝi kun certa pia admiro en la noblan strebadon de nia amata Ludoviko.

Gerrit Berveling (Nederlando)



ludovikito:

kial la organiza projekto de ludoviko fiaskis antaŭ la bulonja kongreso?

s-roj amoureux, lloancy kaj waringhien bonvolis komuniki al mi tradukojn de franclingvaj leteroj skribitaj de francaj esperantistoj je la komenco de tiu ĉi jarcento. laŭ ili ni povas iom ekscii pri la tiamaj kulisaĵoj, kiuj jam fariĝis foraj historiaĵoj por ni posteuloj.

ni unue legu leteron de michaux al bourlet, 1905-1-25. la antaŭa estis la organizinto de la fama unua esperanta kongreso, kaj la dua, unu el la tiamaj elstaraj agemuloj. laŭ jenaj linioj oni ja povus facile imagi al si la tiaman etoson en francujo: jam ia suspekto pri la aferista ambicio de bourlet minac-ŝvebis super la kapoj de francaj esperantistoj.

"se ne estas tro malfrue, ne publikigu la leteron de zamenhof, se li ne tion petis de vi, ĉar mi opinias, ke vi bedaŭros tiun ĉi publikecon, kiu estos ne bone komprenata."

mi supozas, ke la aludita letero estis tiu (05-12), kiu estis tamen publikigita en la n-ro 1 de "lingvo internacia" 1905.

1905-4-14, ludoviko sendis al michaux sian projekton de tutmonda ligo esperantista. samtempe li skribis al li:

"kun plezuro mi permesas, ke mia projekto estu presata samtempe en via "revue" kaj en la "kongresa libro". mi ankaŭ pensas, ke estos la plej bone, se mia projekto (kaj ankaŭ miaj poste sendotaj artikoloj) estos presataj ne en "l'espérantiste" aŭ "lingvo internacia", sed en via "revue" (kaj en la kongresa libro, se vi tion ĉi aprobas)" (05-43).

ni notu, ke, loĝante malproksime de francujo, ludoviko

jam antaŭsentis, ke tiuj du gazetoj kontraŭstaros lian intencon organizi la esperantistojn.

la ĉefagantoj de tiu kontraŭstaro estis beaufront kaj cart. ili suspektis, ke bourlet inspiris al ludoviko ian planon, per kiu li deziras estri la esperantan mondon kun la helpo de hachette. tial, aŭdinte, ke michaux ricevis la projekton de ludoviko, ili postulis de michaux, ke li venu parizon kun ĝi kaj komuniku al ili la enhavon.

1905-4-20, en parizo, supozeble antaŭ ol preni la vagonaron al bulonjo, michaux skribis al iu — plej verŝajne fruictier — leteron, en kiu ni legas:

"mi estis skribinta al vi por anonci mian viziton, samtempe al s-ro cart: tiu ĉi sola ricevis avizon kaj multe mi bedaŭris ne rekonti vin."

kvankam ni ne scias, kiujn cart tiam invitis el sia hejmo por aŭdi la projekton, tamen sen ia dubo, inter ili troviĝis beaufront kaj bréon.

tio ĉi iel klarigas la fakton, kiu mirigas nin posteulojn, ke nur post 9 tagoj de la elsendo de sia projekto, 1905-4-23, ludoviko jam skribis al michaux:

"mi tute ne miras, ke la plimulto da esperantistoj en la unua minuto plivolas unu komitaton ol multajn, ĉar efektive, laŭ unua rigardo, unu komitato ŝajnas multe pli oportuna. ŝajnas al mi tamen, ke post pli longa pripensado multaj venos al tiu sama konvinko, al kiu mi venis, t.e. al la neceseco de kelkaj specialaj komitatoj, kiuj troviĝos sub la gvidado de unu komitato centra" (05-48).

leginte tiujn ĉi liniojn mi supozis, ke michaux responde skribis al ludoviko pri sia opinio aŭ pri alies opinioj ĝeneralaj, kiujn li tiam aŭdis. sed neniam mi povis supozi, ke "la plimulto" konsistis nur el beaufront, cart kaj iliaj partianoj.

en la sama letero ludoviko skribis:

"kvankam kelkaj plej gravaj esperantistoj (interalie s-roj de beaufront, bourlet, cart k.t.p.) skribis al mi, ke ili preferus unu komitaton /.../" (05-48).

sendube tiuj "ili" jam skribis al ludoviko malaprobe pri tiu projekto. sed ni devas apartigi bourlet, ĉar kiel ni poste scios, li ne estis invitita al la tagmanĝo ĉe cart. ŝajne li skribis sian opinion jam antaŭ longe, kiam li ricevis la leteron, kiun michaux menciis en sia letero de 1-25.

kvankam ni ne havas la pruvon, tamen tre verŝajne ĉirkaŭ la 20-a de aprilo, cart skribis rekte al ludoviko, ke li retiru la projekton de organizo. al tiu postulo, cetere tro aŭdaca, ludoviko en sia sen-data letero respondis:

"forĵeti mian projekton mi ne povas" (05-52).

1905-5-4, li skribis al sama cart:

"tial mi forte miras, ke s-ro de beaufront (kaj sub lia senduba kaj tro videbla influo ankaŭ vi kaj s-ro bréon) tiel insiste kaj obstine estas kontraŭ mia projekto ankoraŭ ne leginte ĝin" (05-57).

laŭ tiuj linioj ni estas certaj, ke ludoviko neniom suspektis, ke tiuj homoj jam scias la enhavon de lia projekto. kaj en la sama letero:

"el la leteroj de s-ro de beaufront mi vidas tre bone, ke li tute ne deziras ekkoni mian projekton, nek pripensi aŭ doni iajn konsilojn sed **jam antaŭe** decidis per ĉiuj fortoj kontraŭbatali kontraŭ **ĉia** organizacio, **kia ajn** ĝi estos.

Postrikolto de ludovikaĵoj. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 10. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1985. 307p. 22cm. Bind. Prezo: 48,00 gld.

Per tiu ĉi volumo, kiu portas la n-ro 10 sed estas fakte la 15a eldonaĵo en la serio, la valorega "plena verkaro de l.l. zamenhof" plu kreskas. Temas pri nove trovitaj tekstoj kaj korespondaĵoj de kaj al Zamenhof, kaj multaj el ili estas elstare gravaj kaj interesaj. Ekzemple, la volumo komenciĝas per letero de Zamenhof, el la jaro 1883, skribita al cionistaj pioniroj en Palestino. Kaj jam pro tio mi estas mirigita, ĉar, kvankam estas indikite, ke ĝi estas tradukita "el la rusa", la teksto presita estas fakte mia traduko el la angla, jam aludita sur p.225 de la volumo "korespondaĵo ludovikologia". Mi ŝatus supozi, ke tio estas la sola eraro en la libro.

Sekvas interalie letero al Schleyer; Esperantaj tradukoj de rusaj antaŭparoloj kaj de longa, neniam eldonita, "alvoko al la juda intelektularo", en kiu Zamenhof elmetis sian koncepton pri hilelismo kiel solvo de la juda

al michaux konfidence:

"bedaŭrindega estas la internaciismo de la manifesto de zamenhof. mi estas kormalĝojega, vere afliktegata, ke vi ne povas prokrasti la publikigon, almenaŭ de la 2-a parto."

laŭ ilia insistado michaux prokrastis la publikigon kaj ne rapidis eĉ komenci la kompostadon. 1905-5-9, ludoviko skribis al li:

"la presadon de mia projekto (kune kun la antaŭparolo) vi povas jam komenci" (05-60),

kaj samtage sendis al li la "aldonon al la projekto de tutmonda ligo", en kiu ni legas:

"kiam mia projekto estis jam sendita por publikigo al s-ro michaux, mi komencis ricevadi diversajn leterojn, el kiuj mi konvinkiĝis, ke la esperantistoj kredeble ne volonte akceptos ion pretan" (05-61).

jes, la esperantistoj ne volonte akceptos ĝin, ĉar cart kaj beaufront penis ĝin malplaĉigi al ili. 1905-5-12, ankaŭ konfidence, cart skribis al michaux:

"hodiaŭ mi ricevis de zamenhof 10-paĝan leteron (= 05-57), en kiu li rearanĝas sian projekton en tiu senco, ke li pretas **starigi liston** kaj "ĉion retiri". fakte li estis trom-

problemo; leteroj al Fried, Cart k.a.

Elstare interesa, laŭ mi, estas la longa sekcio, kiu prezentas leterojn de Sebert kaj Javal al Zamenhof, el la jaroj 1905-1907. Nur kelkaj el ili estas jam publikigitaj. Grandparte ili estis verkitaj france, kaj nur nun estas tradukitaj en Esperanton. Tiu korespondado estis ĝis nun konata al ni ĉefe de la flanko zamenhofa; jam ni konas ĝin de la alia flanko, kaj tio iom modifas niajn impresojn, precipe pri Javal. Ekzemple, pro sia obseda deziro reformi la lingvon. li vidigas sian elitismon. Laŭ li, el la plimulto, kiu en 1894 voĉdonis kontraŭ reformoj, "... pli ol 4/5 havis nomojn rusajn aŭ polajn; tiuj estis, por tiel diri 'malalta mondo' ...kies nomoj estis nekonataj... Male, la reformema malplimulto konsistis, preskaŭ tute, el germanaj aŭ skandinavaj universitatanoj: oni kalkulis la voĉojn anstataŭ pesi ilin". Nu, kiuj finfine montriĝis pravaj?

Denove gratulon al la dediĉita eldoninto.

William Auld (Skotlando)

sekve ĉiu mia korespondado kun li pri tiu ĉi temo estus tute vana. tiel same obstina kun sia opinio estos s-ro bourlet.

tial mi almenaŭ petas **vin** (kaj per vi ankaŭ la aliajn plej gravajn parizajn esperantistojn), ne rapidu tro multe kun via decido, sed atendu la publikigon de mia projekto, pripensu ĝin bone (sed pripensu ĝin **memstare**, libere de ĉia fremda influo) kaj tiam skribu al mi vian opinion. tiam, mi petas, skribu al mi, ĉu vi daŭrigas malaprobi **ĉian** organizacion, aŭ vi deziras nur ke la organizacio estu **alia**, kaj **kiajn** ŝanĝojn aŭ kian alian projekton vi proponas" (05-57).

ja, tute vana klopodo.

cart kaj beaufront samuŝe admonis al michaux, ke li prokrastu la publikigon de la projekto. jen la ekzemplo, kiamaniere cart insistis prokrastigi ĝin. 1905-5-5, li skribis

pegita de nia samideano, kiu kredigis al li, ke nome de la ĉefaj el ni li parolis. kaj jen la tuta projekto estas nur **mi-litmaŝino kontraŭ s.f.p.e.**"

ni ja povas klare vidi, kiel cart komprenis la esencon de la ludovika projekto. per "samideano" li parolis pri bourlet. en la sama letero li plie diris:

"en ĉiuj tiuj **detaloj** mi rekonas nian naivan kaj ruzan samideanon, kiu uzas zamenhof kiel "laŭtparolilon" por tio, kion li **kulise** murmuretis."

1905-5-17 cart skribis al michaux kaj rememorigis al li la tagon, en kiu li venis parizon:

"jen kial ŝajnas al mi necese ne disiĝi de la projekto de la s.f.p.e., kiu estas nur la "sumo" de nia lasta interparolado post la tagmanĝo ĉe mi. tiurilate, kiel mi gratulas min pro la fakto, ke vi bonvolis esti mia gasto!"

post longa atendado ludoviko finfine ricevis la provaĵon. 1905-5-22 li skribis al michaux:

"antaŭ 2 tagoj mi resendis al vi la provan presaĵon de mia "projekto de regularo", kiun mi korektis kaj kiun vi kredeble jam komencis presigi" (05-68).



ludoviko mem estis tre fervora publikigi sian projekton kaj la kontraŭuloj estis pli fervoraj malhelpi ĝian publikigon, tamen mi opinias, ke ĝi ne multe interesis tiamajn esperantistojn. krom la koncernatoj, t.e. ielaj aspirantoj dezirantaj estri la movadon, neniuj serioze ĝin atentis. por multaj ĝi estis nura tedaĵo apenaŭ tralegebla. 1905-6-7, borel, tiama germana agemulo, skribis (esperante) al bourlet:

"laŭ peto de prof. cart mi ankaŭ publikigos la regularon proponitan de la s.f.p.e. se ni ne volas plilongigi la priparoladojn pri tiu ĉi afero, kiu havas malgrandan intereson por la plej parto de la legantoj."

laŭ letero de lambert al bourlet 1905-7-7, ni ekscias, ke ankaŭ francoj opiniis "un projekton tedaĵo!"

"mi diris al berthelot, ke li ne enpresu la tro longan leteron por sendo de la projekto, skribitan de zamenhof."

tio ĉi temis pri 05-44.

en malproksima varsovio, kiel ludoviko pensis pri tiuj reagoj kontraŭ sia projekto? 1905-6-12 li skribis al bourlet:

"mi scias tre bone, ke la komitatanoj de s.f.p.e. faras ĉion, kion ili povas, por malplaĉigi mian projekton de ligo al la estontaj kongresanoj" (05-80).

"/.../ mi nur bedaŭras, ke sub la influo de la komitatanoj de s.f.p.e. s-ro michaux tro multe prokrastis la publikigon de mia projekto kaj presis ĝin nur **nun**, kvankam mi sendis al li la projekton ankoraŭ en **aprilo!**" (sama letero).

kvankam jena letero temis ne pri la projekto de ligo sed pri la projekto de deklaracio, tamen mi opinias, ke la situacio ne multe diferencis. 1905-6-14, ludoviko skribis al michaux:

"se vi konsiliĝadus **nur** kun la komitato de s.f.p.e. kaj ĉiuj aliaj esperantistoj ekkonus mian projekton **tro malfrue**, kiam ne restos jam tempo por konsiliĝadi kaj kiam la opinio de la esperantistaro estos jam antaŭpreparita per unupartiaj artikoloj en "l'espérantiste" kaj "lingvo internacia", — tio ĉi estus por mi tre dolora" (05-81).

laŭ la insista peto de bourlet ludoviko decidis, ke li vizitos parizon antaŭ ol iri bulonjon. tiam cart skribis al michaux, 1905-6-21, prave aŭ malprave, sian intencon rezigni al ludoviko la projekton:

"oni esprimis la deziron, ke d-ro zamenhof plifruigu je kelkaj tagoj sian vojaĝon al parizo, tiel ke, pli bone informita, konante la ĝustan situacion, li komprenos, kiom **lia** projekto estas malutila por la esperantista afero kaj fine li ĝin retiros."

samloke ni legas lian aŭguraĵon pri lia samideano:

"vi vidos, ke hachette dronigos bourlet same kiel bourlet dronigos hachette! ili sin ligis tiamaniere, ke unu pereigos la alian! kaj oni bedaŭre imagas, ke, kaj de unu kaj de la alia, oni povus atendi por la esperanto-afero tiom da utiloj!"

1905-7-15 michaux skribis al bourlet, kiamaniere oni vidis la aferon pri tiu organiza projekto tuj antaŭ la kongreso:

"mi ja ricevis leterojn, en kiuj oni diras al mi, ke vi estas la aŭtoro de la projekto de zamenhof, kaj ke la grupo de parizo volas estri la aferon, ĉu por ke francujo estu ĉe la kapo de la movado, ĉu por ke hachette monopoligu ĉiujn produktaĵojn. estas tamen facile vidi, ke la longa projekto de zamenhof ne estas franca projekto! ĝi estas tro longa kaj tro komplika por ni."

1905-7-18 cart skribis al michaux kaj lerte pravigis la projekton de s.f.p.e kaj ĝian originon.

"la s.f.p.e. estus akceptinta la projekton de zamenhof ĉar tiam ĝi ne supozis, ke la projekto povus esti alia ol

Post la iel-tiela kompletigo. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 2-bis. Kioto: Eldonejo Ludovikito, 1986. 285p. 22cm. Bind. Prezo: 37,50 gld.

La jubilean eldonon por la centa jaro de Esperanto iniciatitan de Ludovikito fermas la volumo titolita "Post la iel-tiela kompletigo" — ĝi estas same kiel la antaŭaj lukse eldonita kaj tipografita kun desegnoj de s-ino M. Fruscieva. La enhavon konsistigas ĉefe la korespondaĵoj inter la aŭtoro kaj prof. Gaston Waringhien el la jaroj 1981-86. En la volumo oni povas trovi ankaŭ leterojn de Sofio Zamenhof al Albert Dauphin, kiujn sekvas eliro el la taglibro de Sergeo Tanejev kaj taglibro pri kelktaga restado de la aŭtoro en hospitalo. Fine oni trovas ankaŭ komentariojn koncernantaj la misteron pri la ordeno de la Honora Legio donita (?) al L.L. Zamenhof, pri kio la oficialaj francaj fontoj mencias nenion. La tuton fermas recenzoj pri la unuopaj volumoj eldonitaj de Ludovikito kaj indekso de nomoj menciitaj aŭ diskutitaj sur la paĝoj de la libro.

La legaĵo enkondukas nin en la laboretoson de nelacigebla zamenhofologo kaj bibliografiisto s-ro Itô Kanzi kaj konatigas al ni liajn problemojn kaj zorgojn, liajn ĝojojn kaj tristojn. La leterinterŝanĝo inter prof. G. Waringhien kaj la aŭtoro enhavas multajn valorajn rimarkojn kaj interpretajn klarigojn pri diversaj eventoj, ligitaj al la fruaj jaroj de la Esperanto-movado kaj al L.L. Zamenhof mem. Krom multaj gravaj historiaj sciindaĵoj kaj komentarioj pri la bibliografiaĵoj, la leganto povas informiĝi ankaŭ pri pli bagatelaj faktoj de nia Movado — kiel ekz. pri la arkivisto, kiu bezonis unu jaron por sendi fotokopiojn de leteroj de L.L. Zamenhof al Schneeberger; aŭ pri granda monperdo, kiun kaŭzis al UEA luksa eldono de Malnova Testamento, "...pri kio nenio aperis en la oficialaj dokumentoj!!" (p.110).

Ryszard Rokicki (Pollando)

Ludovikologiaj biografietoj. Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kromkajero 3, Kioto: Ludovikito, 1987. 335p. 22cm. Ilus. Prezo: 37,50 gld.

Ĉi tiu volumo entenas, krom la tri unuaj pecoj, ne verkojn de Zamenhof mem, sed ĝenerale dokumentojn pri la frua historio de Esperanto. Ĝi konsistas el tri partoj. La unuaj bedaŭrinde ne havas titolon, sed povus nomiĝi: "Rememoroj pri Zamenhof". La dua titoliĝas "Nun veteranoj parolas" kaj la tria "El la inkunabloj".

La unua parto estas tre informriĉa por sciencisto kiu volas formi kiel eble plej precizan bildon pri la vivo de Zamenhof, sed ne nepre leginda kiel tuto por ordinaj esperantistoj: por ili la diversaj fontoj (grandparte parencoj de Zamenhof) iom tro ripetas unu la alian. Ĝi konfirmas la jam ekzistantan bildon, ke Zamenhof estis homo homama (vidu ekzemple lian ĉiusemajnan tagon de senpaga kuracado de malriĉuloj), modesta, tre motivita en sia laboro por la internacia lingvo, nature tre inteligenta kaj diligenta. Nur kiu atente legas tiun parton rimarkos, ke Zamenhof havis ankaŭ homajn malfortojn, ekz. fumemon (laŭ lia filo Adam, p.67-68), kiu verŝajne malplilongigis lian vivon.

Vera trezorminejo pri la frua historio de Esperanto estas la dua parto. Tre leginda por adeptoj de aliaj

planlingvoj estas "Zamenhof pri la reformoj" (p. 164-171). El ĝi ili povas lerni, ke la reforman krizon en Esperanto kaŭzis ne unue la difektoj de Esperanto, sed la fakto, ke ankaŭ planlingvokonstruinto ne povas kontentigi ĉiujn homojn samtempe. Samkiale povus interesi ilin "K. Gerŝater: V. Devjatnin kontraŭ 'la'" (p. 175-176), pri ampleksa movado kontraŭ la artikolo ĉ 1910, malgraŭ la dubo de Ludovikito pri ĝia ekzisto. Ludovikito citas sen komento plurajn asertojn de Grabowski, ke li kaj Zamenhof faris la unuan konversacion en Esperanto, malgraŭ la kritiko je tiu aserto i.a. de Golden.

La tria parto konsistas el du literaturaj tradukoj el la unuaj jaroj de Esperanto. Ili havas la saman valoron kiel ia poemoj de poste fama poeto kiam tiu estis 15-jara infano: t.e. kiel la fonto por studo de la evoluo de lia verkaro (respektive de la lingvo), ne pro sia propra estetika valoro. Ili pruvas, ke en la unua tempo eĉ la plej bonaj stilistoj sklave laŭvorte tradukis el naciaj lingvoj, kaj nur poste la esperantistoj lernis ekspluati la proprajn eblojn de la strukturo de Esperanto. Ili entenas ankaŭ multajn nepravajn lingvajn erarojn. Oni rimarkas, ke tiam la sintakso de Esperanto ankoraŭ ne estis normigita, ekz. la regulo, ke objekta predikativo staru en la nominativo, tiam ankoraŭ ne ekzistis.

W.A. Verloren van Themaat (Nederlando)

lingva. estas vi, kiu malfermis niajn okulojn, kaj neniuj pli bone ol vi povus atesti pri nia surprizo kaj niaj timoj je la aŭdo de la intencoj de Zamenhof."

post 3 jaroj de la unua kongreso, 1908-5-29 ludoviko skribis al Michaux pri tiama cart:

"antaŭ la bulonja kongreso, kiam ekzemple jam en la vojo al la kongreso mi legis en lia gazeto, ke mia projekto de ligo estas ne sole idiota, sed eĉ malhonesta kaj enhavas en si 'ruze kaŝitan glavon'!" (08-77)

nun, laŭ la aŭtentaj dokumentoj, ni ekscias pri la tiama efektiva irado de la okazintaĵoj. la artikolon de fruitier, "ĉu vivi aŭ morti?", oni legu en nia kajero 7-bis, p.50-55. kaj tie ĉi ni unue citu la leteron de cart al Michaux, 1905-8-2:

"Zamenhof tre koleris pro la artikolo de fruitier, kiun li kredis inspirita de mi kaj kontraŭ li."

saman tagon, pri la sama afero Bourlet skribis al sama Michaux:

"Zamenhof skribis el Berlino al cart kaj fruitier, ke li rifuzos ilin renkonti dum sia restado en Parizo. laŭpete de generalo Sebert kaj de d-ro Javal, li ilin akceptis kaj tiel, laŭŝajne, nenio aperis el la atakoj kaj kalumnioj, kiujn Zamenhof kaj mi suferis flanke de tiuj sinjoroj de 2 monatoj."

en la sama letero ni legas jenon, laŭ kiu ni konstatas, ke Bourlet ne estis invitita de cart-Michaux.

"antaŭ du tagoj mi eksciis de Zamenhof mem la proponojn, kiujn li aldonis al sia projekto, proponojn, en kiuj li donis al mi gravan lokon. mi fine eksciis, pri kio oni akuzis min!"

kaj ni scias, ke en sia letero de 7-31 ludoviko jam skribis al Michaux jenon:

"mi parolis kun ĉiuj kaj mi ĉion aranĝis kaj pacigis; ĉio estos en bona ordo" (05-105).

ja, tro bonkora paciganto-paciĝinto.

jen la rememoro de Michaux post 28 jaroj!

1933-3-16 li skribis al Bastien:

"antaŭe, mi iris legi la projektojn de Zamenhof ĉe cart, kie estis la ĉefaj aktoroj: cart ekkriis: tio estas slavaĵo! kaj Michaux ne kapablos briditi tiun frenezulon!"

je la fino, jen kortuŝa bildo pri nia povra ludoviko. en la sama letero ni legas:

"lia sola pura ĝojo estis lia restado en bulonjo de la 6-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1905. la antaŭtago kaj eĉ la unua tago de la kongreso estis tre deprimaj. li ploris por konservi sian unuan tekston kaj ĉefe sian himnon, kiun cart, Boirac, Bourlet volis nepre elstrecki el la programo, dirante, ke oni prifajfos. feliĉe, tiuj akraj diskutoj okazis en mia salono, kaj tiuj sinjoroj manĝadis en mia hejmo, kio donis al mi sufiĉe da aŭtoritato por tre energie apogi la dezirojn de Zamenhof."

aldonaj rimarketoj:

1) la projektojn de s.f.p.e. kaj pariza grupo, kaj la artikolojn de fruitier, Beaufront kaj aliaj oni legu en pvz: kajero 7-bis "la neforgeseblaj kongresoj".

2) la franclingvajn leterojn, kies etajn partojn ni povis citi en tiu ĉi artikolo, oni povas legi tutaĵe en pvz: kajero 6-bis "la franca periodo de Esperanto kaj Louis de Beaufront".

3) la ludovikaĵojn oni bonvolu serĉi en pvz laŭ la indiknumeroj sialoke almetitaj.

La sekvaj ses paĝoj surhavas elektitajn elĉerpaĵojn (do ne plenajn tekstojn) el la komuna seminario inter UEA kaj Monda Pac-Konsilio, pri kiu ni raportis pasintnumere (Esperanto 1987/p.212). Tiuj referaĵoj ne simple emfazas la temon de paco: ili ankaŭ prilumas la diferencojn kaj aparte la similecojn inter du movadoj, kiuj kune celas (laŭ la temo de la seminario) "interhoman kompreniĝon, interpolan pacon". Kaj ilian signifon por niaj aktivistoj trafe esprimis Humphrey Tonkin en sia enkonduko, jene.

Humphrey Tonkin:

Oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo

La unua duono de la parolado de d-ro Tonkin konsistis el materialo jam konata al esperantistoj: priskribo de la Universalaj Kongresoj kaj resumo de la Deklaro de Bjalistoko (Esperanto 1987/p.154). Ni rekomendas (re)legon de la Deklaro kiel deirpunkton por la dua parto de lia teksto.

Kompreneble ekzistas tiuj, kiuj konsideras la lingvan problemon minora inter la grandaj internaciaj problemoj. Ofte niaj specialistoj pri internaciaj aferoj eĉ ne aludas ĝin en siaj listoj de ĉefaj internaciaj demandoj. Multaj tiuj fakuloj eĉ ne konsideras la internacian komunikadon grava problemo, malgraŭ tio, ke la lukto inter la grandaj ideologioj de la mondo daŭras, la nacioj nur pene sukcesas kunvivi paco eĉ en plej bonaj okazoj, kaj la inter-

nacia kunlaboro restas improvizita, primitiva, kaj ofte neadekvata al la bezonoj. Tie kie ekzistas internaciaj organizaĵoj por akceli tiun kunlaboron, la organizaĵoj estas ofte malestimataj aŭ tiel interne disdividitaj, ke ili ne kapablas decidani agadon.

La internacia komunikado ja ne estas celo en si mem, sed rimedo. Eble pro tio ĝi malofte menciigas en listoj, kiuj estas laŭ karaktero celaj. Tamen, kiel klare asertas la bjalistoka dokumento, "La demandoj de ekonomia evoluigo, de malarmado, de malsato, de malsano, de analfabeteco, de mediprotektado, k.s., postulas komunan kaj egalecan aliron pere de rekta komunikado en komuna lingvo." La aludo al egaleco estas grava: multaj mondaj problemoj ne estas solveblaj nur de la grandaj potencoj, sed postulas komunan, egalecan pritrakton. Esperanto metas ĉiujn homojn je la sama nivelo kaj do ebligas traktadon de internaciaj problemoj en egala etoso — kontraste al la naciaj lingvoj, kiuj avantaĝas iujn kaj diskriminacias aliajn. Iasence, do, solvo de la lingva problemo, kaj de la problemo de internacia komunikado ĝenerale, estas antaŭkondiĉo por adekvata kaj daŭra solvo de aliaj problemoj mondaj.

La Deklaro de Bjalistoko, kvankam ĝi ne estas la unua dokumento, kiun la esperantistoj direktis al ŝtatestroj kaj aliaj aŭtoritatuloj, estas eksterordinare grava. Ĝi tuj sekvas alian elpaŝon faritan ne en formo de deklaro sed en formo de rezolucio — rezolucion de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, akceptitan fine de 1985, kiu rekonis "la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la inter-



La 29an de julio, 1987 kunvenis pli ol mil esperantistoj en la naskiĝloko de Zamenhof. La Deklaro de Bjalistoko unue akceptiĝis kadre de tiu manifestacio.

nacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj," kaj kiu rekomendis ĝian pli vastan utiligon en la internaciaj rilatoj kaj en la lernejoj. La rezolucio de Unesko estas signifa en tio, ke ĝi originis ekster la Esperanto-movado, do en la formalaj politikaj rilatoj inter la ŝtatoj. La Bjalistoka Deklaro, tamen, pli klare ol iam ajn antaŭe, ligas la lingvan demandon senpere al aliaj grandaj problemoj inter la ŝtatoj kaj inter la unuopaj homoj.

Tra la jaroj, la Esperanto-movado large diskutis tiun rilaton inter Esperanto kaj la pli vasta mondo de aferoj. Tiu estis temo de deklaro farita en la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, kiu notis, ke Esperanto estas unuavice lingvo utiligebla por ĉiu ajn celo, do ne fenomeno kun specifa idea programo. Kvankam ekestis, precipe en la 20aj kaj 30aj jaroj de nia jarcento, organizaĵoj, kiuj utiligis Esperanton por pli-malpli specifaj politikaj celoj, la centraj strukturoj de la Esperanto-movado restis politike neŭtralaj. Kompare kun multaj aliaj sociaj movadoj, la Esperanto-movado relative bone sukcesis malhelpi, en la

postmilitaj jaroj, ke aliaj, flankaj problemoj aŭ malsameco de politikaj opinioj ĝin dividu. Universala Esperanto-Asocio mem zorge evitis prenon de politikaj starpunktoj, kiuj ne rilatis al Esperanto: ĝia statuto klare proklamas ĝian neŭtralecon. Samtempe, la moderna UEA, pli multe ol en antaŭaj periodoj, estas preta engaĝiĝi en la debaton ne nur pri lingvoj sed ankaŭ pri grandaj mondaj problemoj ĝenerale. Esperanto ja prezentas unike bonan rimedon, aŭ forumon, por fari tion.

Kvankam foje ni ŝatus imagi tion, politika neŭtraleco ne estas absoluta koncepto, sed relativa. UEA klopodas resti super politikaj disdividoj, sed ĝi praktikas principon de "pozitiva neŭtraleco": ĝi ne prenas starpunkton pri demandoj ekster sia statuta kompetento, sed ĝi laŭpove ebligas liberan diskuton almenaŭ pri tiuj demandoj, kiujn eblas diskuti en libera forumo en difinita kunteksto. Tio ja estas nur praktika realigo de la ideo malantaŭ Esperanto — la ideo de internacia komunikado en egaleco. Eĉ pli esence, la Asocio konscias, ke oni ne povas aliri la lingvan problemon en izolo: ĝi estas rekte ligita al aliaj demandoj.

Efektive, lingvoj en si mem estas politikaj fenomenoj. La elekto de tiu aŭ alia lingvo en difinita politika aŭ socia sfero estas grava faktoro en la politikaj kaj sociaj rilatoj mem. Oficiala utiligo, ekzemple, de la angla lingvo, aŭ la franca lingvo, en ekskolonia lando, kiel lingvo de la registaro, povas limigi partoprenon en la politika vivo nur al tiuj, kiuj konas tiun lingvon. Utiligo de indiĝena lingvo, aliflanke, anstataŭ favori difinitan ekonomian tavolon (kiel emas uzado de ekskoloniaj lingvoj), povas favori unu aŭ alian etnan grupon. Kia ajn estu la solvo, minimume tiu solvo metas ĉiujn personojn, kiuj ne regas la oficialan lingvon, en staton de dependeco je tiuj, kiuj ja ĝin regas. Multlingvismo ankaŭ ne solvas la problemon: ĝi estas multtekosta kaj malfacile administrebla, kaj ofte ŝajnigas solvi situacion efektive ne solvitan ĉar ekzistas hierarkio de lingvouzo.

Rifuzo aŭ neeblo utiligi difinitan lingvon en difinita kunteksto povas facile forŝlosi personojn el partopreno. Tiel la lingvo fariĝas ilo de diskriminacio aŭ de ekskluzivado, kaj lingvaj diferencoj naskas reciprokan malamon aŭ suspektemon. Aliflanke, troa insistado pri la supereco de la propra lingvo, kiel unu elemento en politika aŭ kultura aŭ ekonomia supereco, povas konduki al subpremo aŭ milito.

Ĉion ĉi la esperantistoj komprenas pli bone ol multaj aliaj, ĉar ili ja daŭre studas la lingvan problemon kaj cerbumas pri ĝia efiko je la monda politiko. Pro tio ili pleddas por neŭtrala solvo al la lingva problemo — neŭtrala en la senco, ke ĝi favoras neniun unuopan homgrupon, kvankam ĝi estas facile lernebla por ĉiuj. Nur en situacio maksimume senigita je la misa utiligo de potenco, kaj en situacio kie ne staras periloj kaj interpretiloj inter la homoj (ĉu en formo de lingvaj servoj, ĉu en formo de registaroj aŭ aliaj instancoj, kiuj malebligas senperan kontakton) povas okazi tiu vera kompreniĝo, kiu kondukos al la paca solviĝo de la multiĝantaj problemoj de la homaro, kaj al la kunlaboro ĉirkaŭ la bonaj perspektivoj, kiuj sin prezentas al nia socio. Jen, mallonge, la spirito de Bjalistoko, kiu donis novan impulson kaj novan esperon al nia Internacia Lingvo Esperanto.

PRI MONDA PAC-KONSILIO

MPK fondiĝis en 1950, laŭ la iniciato de la Kongreso de Subtenantoj de Paco (Parizo 1949 kaj Varsovio 1950). La Konsilio mem havas iom pli ol 1500 individuajn membrojn, plejparte eminentulojn aŭ aktivajn pacmovadajn organizantojn, kiuj reprezentas ĉ. 140 landojn kaj diversajn internaciajn organizaĵojn. Ĝia elektita gvida organo estas la Prezidio, analoga al la Komitato de UEA; ene de ĝi, ĉ. 40-opa vicprezidentaro plus la Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario formas la Buroon, kiu respondecas pri la plenumo de konsiliaj decidoj. La du laste-nomitaj funkciuloj laboras plentempe, bazite ĉe la sidejo en Helsinko, kie cetere laboras la Sekretariato (aŭ profesia stabo).

La Statuto de MPK listigas ok celojn aŭ principojn, inkluzive malarmadon, kontraŭrasismon, respekton de sendependeco kaj landa integreco, neenmiksiĝon en internaj aferoj de nacioj, starigon de reciprokaj amikaj rilatoj en komerco kaj kulturo, pacan kunekzistadon de malsamaj politikaj sistemoj, anstataŭigon de perforto per negocado. En la praktiko tiuj principoj estas interpretataj "socialisme", sed socialismo en si mem ne estas oficiala politiko de la Konsilio. La Statuto aparte emfazas la gravecon de Unuiĝintaj Nacioj, la Fina Akto de Helsinko (1975) kaj la Movado de Nealiancitaj Landoj, kaj cetere la bezonon kunlabori kun kiel eble plej multaj kaj diversaj organizaĵoj.

MPK havas konsultajn rilatojn kun Unesko (kategorio A) kaj UN, kaj kunlaboras kun multaj aliaj internaciaj organizaĵoj registaraj kaj neregistaraj. La Sekretariato eldonas du internaciajn revuojn, *Packuriero* kaj *Novaj perspektivoj*, sed la pleja forto de MPK (kiel ĉe UEA) kuŝas en ĝiaj landaj sekcioj. Ilia graveco kaj aktiveco kompreneble varias multe de lando al lando — ekzemple, ne ekzistas filio en Ĉinio. Tamen, en pluraj landoj de la Tria Mondo, en kelkaj okcidentaj landoj kaj pli-malpli ĉiuj socialismaj landoj, la naciaj sekcioj rolas influe aŭ eĉ centre en la organizado de la kontraŭrasismaj kaj pormalarmadaj movadoj.

Nur per kunlaboro ni antaŭeniros


Unue mi diru, ke ni ĝojas kunveni kun Universala Esperanto-Asocio en la jaro de la Jubileo de Esperanto. Ni provis informiĝi kiel eble plej funde pri viaj movado kaj Asocio. Kaj ni certe konsentus kun tio, kion diris antaŭ longe la fondinto de Esperanto, d-ro Zamenhof: "Malamikeco inter la nacioj, falu, falu — jam estas temp'!" Mi scias, ke ankaŭ hodiaŭ multaj esperantistoj uzas tiujn vortojn por emfazi sian sindediĉon al la afero de monda paco.

Mi kredas, ke lia kaj via tuta koncepto estas tre bone esprimita en tiu plej lasta deklaro de via 72a Kongreso en Varsovio. Vi kompreneble konsentas, ke la mondo ŝanĝiĝas. Ni vivas en epoko, kiam la danĝero de nuklea neniigo de ĉiuj homoj sur la tero estas pli granda ol iam ajn antaŭe. Oni devas ripetadi tion, ĉar la armiloj kiuj nun ekzistas kaj kiujn oni nun priesploras kaj preparas, estas de tute nova speco.

Sed samtempe kun la komenco de nia seminario pleniĝas nin nova espero. Ja estas viaj lingvo kaj movado aferoj de espero. Espero pri kio? Espero pri tio, kion via fondinto nomis la interligo de la manoj de ĉiuj popoloj en la strebado por paco.

Hodiaŭ ni havas la novaĵon, ke la gvidantoj de la du grandaj potencoj renkontiĝos la 7an de decembro. Ni deziras al ili ĉian sukceson. Kaj ni esperas, ke ĉie la popoloj faros ĉion eblan por insisti, ke estiĝu interkonsento por paco inter tiuj grandaj potencoj.

Sed mi tre forte samopinias kun tio, kion ĵus diris d-ro Tonkin, nome ke ne temas nur pri la grandaj potencoj — ke ili solaj ne povas alporti pacon al la mondo. Estas la tasko de ni ĉiuj kaj de ĉiuj registaroj kaj popoloj.



Supre: Du membroj de la Internacia Patrona Komitato por la Centjara Jubileo salutas unu la alian. Maldekstre, Amadou Mahtar M'Bow (ĝenerala direktoro de Unesko de 1975 ĝis 1987); dekstre, Romesh Chandra, prezidanto de Monda Pac-Konsilio.

Ni kredas, ke pli kaj pli da homoj kontraŭas la militon. Sed la milito, kiun ni ĉi-momente frontas, ne estas la milito de antaŭ cent jaroj, aŭ 40 jaroj, aŭ 30 aŭ 20 aŭ eĉ dek jaroj. Ni troviĝas en la nuklea kaj kosma epoko. Kaj ni kredas, ke tio postulas novan manieron pensi. Sekureco ne plu konsistas en la havo de nukleaj armiloj, nek en preparoj fari la unuan baton, kiel kredis potencaj registaroj antaŭ nur du aŭ tri jaroj. Tiu unua bato estus la lasta bato. Antaŭ nur kelkaj jaroj ni kutimis diri, ke tiu unua bato kondukus al la dua bato, kaj sekve al la tria, kaj poŝtupe la mondo detruigus. Sed hodiaŭ la sciencistoj de Usono, de Sovetunio kaj de ĉiuj landoj estas tute certaj, ke la uzo de nukleaj armiloj kondukus al la tiel nomata nuklea vintro. Kio signifas simple, ke la sunlumo estus forbarita de la tero. Kaj tio signifas, laŭ esprimo de la nobelpremiitaj Internaciaj Kuracistoj por la Prevento de Nuklea Milito: Tiuj, kiuj mortus poste, dezirus esti mortintaj la unuaj. Ĉar ĉiuj ja mortus.

Jen kial ni bezonas tute novan aliron al niaj problemoj. La sekureco de iu flanko estas certigebla nur per la sekureco de ĉiuj. Tial la tuta aliro al armiloj, tiel nomata sindefendo, estas ŝanĝenda. Oni devas rigardi la sekurecon afero ne nur armila sed ankaŭ ekonomia, politika, ekologia, humanisma... Ĉiuj problemoj bezonas komunan aliron. Ekzistas nur unusola strebo.

Ni diras ne nur, ke ni ne volas morti, sed ankaŭ ke ni ne volas, ke aliaj homoj mortu. La plej granda movado de Eŭropo kaj Norda Ameriko estis tiu, kiu kolektis monon por la malsatmortantaj en Afriko. Kaj la pacmovado diras, ke ankaŭ la mondo devas ne morti — hodiaŭ aŭ morgaŭ. Iuj konsideras nin movado de timuloj. Jes, ni timas.

Ni timas la detruon de la mondo. Sed estas ni, kiuj havas la plej grandan optimismon: ĉar ni kredas, ke eblas mondo sen nukleaj armiloj, sen malsato, sen malriĉo.

Tial ni kredas, ke ni komencas vidi la unuajn fruktojn de nia multjara batalo en la malpermeso, la elimino de mez- kaj malplilongdistancaj raketoj pere de traktato, kiun oni espereble subskribos en decembro. Estas nia espero, ke ĉi tiu pintkunsido kondukos ne nur al la subskribo de ĉi tiu historie grava traktato, sed ankaŭ malfermos la pordon al la subskribo de aliaj interkonsentoj por la malpliigo de la strategiaj raketoj je 50 procentoj, por la malpermeso kaj ĉesigo de ĉiuj atombombaj testoj, por tio, ke la kosma spaco estu uzata nur por pacaj celoj kaj neniam por milito, por la malpermeso de kemiaj armiloj. Kaj ni pluiru al la malpliigo kaj poste, ni esperu, al la elimino eĉ de konvenciaj armiloj. Ĉio ĉi estas ebla.

Antaŭ iom da tempo homoj diradis: "Ni volas forigi nukleajn armilojn, sed tio ne povos okazi." Se ni povos certigi kaj devigi la grandajn potencojn subskribi ĉi tiun traktaton en decembro, tio ja konsistigos la unuan paŝon en la historio por elimini nukleajn armilojn.

Ni kredas, ke nova aliro al la problemoj de paco realiĝas ĉie inter la popoloj. Ni bezonas grandan kolicion de ĉiuj, kiuj deziras interkomprenon kaj pacon. Ĉiu el ni havas propran vidpunkton, kaj ni devus fieri pri tio, ĉar ĉiu organizaĵo — el milmiloj — kontribuas al paco laŭ sia propra maniero. Sen ĉiu el ili, ni ne antaŭenirus.

Ni havas vastajn movadojn, kiuj kontraŭluktas la rasismen, la apartismen. Tiuj movadoj kreskas; sed ili ne venkos solaj. Estas vastaj movadoj, kiuj celas nur la malarmadon; sed ni ne atingos malarmadon, se ĉiuj ne kunigos. Kaj miatakse, tio, kio gravas nun, estas ke ĉiuj organizaĵoj komencas vidi, ke ekzistas nur unusola strebo. Kaj ke eblas kune venki.

Tial mi konsideras ĉi tion tre grava okazaĵo por Monda Pac-Konsilio. Nuntempe, ni bezonas aŭskulti unu la alian.

Je la 9a kaj 10a de februaro venontjare, grupo de internaciaj neregistaraj organizaĵoj organizas gravan konferencon en Ĝenevo. Temas pri ses invitataj organizaĵoj, tre gravaj, tre malsimilaj unu de la aliaj: la Monda Eklezia Konsilio, la Monda Federacio de UN-asocioj, la Monda Veterana Federacio de ĉiuj militpartoprenintoj, la Internacia Ligo de Virinoj por Paco kaj Libero, la Internacia Demokratia Federacio de Virinoj, la Internacia Junulara-Studentara Movado por UN kaj la Monda Pac-Konsilio.

La temo estas: "Kiel elradikigi la bildon de la malamiko". La tuta amaskomunikilaro de certa speco plenplenas ĉiutage je bildoj pri aliaj landoj, aliaj popoloj kiel malamikoj. Mi ne scias, ĉu vi spektas ĉi tiujn filmojn — mi mem ne, sed mi aŭdis pri ili; estas iu nomata Rambo. Mi ne kontraŭas, ke iuj ŝatas vidi homojn pafi unu la alian. Tio estas ilia afero. Mi mem ne ŝatas ĝin, ĉar mi estas paci-

fisto. Sed kion montras tia filmo? Ĝi montras, ke tuta popolo kiun ĝi malŝatas estas subnivela. Mi memoras, kiam ni aŭdis ke usonaj soldatoj eniris vilaĝon en Vjetnamio kaj mortigis ĉiujn: My Lai. Kiel oni povis fari tion? Kiel tio eblis? Dum jaroj oni trejnigis ĉi tiun junajn homojn, bonajn junulojn kiuj kredis, ke ili batalas por sia lando, oni pleniĝis iliajn mensojn per la ideo ke la vjetnamo estas subhomo, kvazaŭ besto kiun oni devas ĉasi.

Kaj hodiaŭ — tio okazis antaŭ longe; tie ne temis pri nukleaj armiloj. Hodiaŭ oni pravigas nukleajn armilojn per tio, ke ni frontas malamikon kies popolo volas detrui la mondon aŭ konstrui socion, kiu kontraŭas la interesojn de nia popolo. La bildo de la malamiko fariĝas io, kion ni devas kontraŭbatali.

Mi kredas, ke en tiu konferenco, por kiu kunlaboras multaj organizaĵoj, estus tre grave prezenti la grandan rolon, kiun ludas Universala Esperanto-Asocio en la konstruo de interkompreno. Ĉar konstrui interkomprenon estas batali kontraŭ la bildo de la malamiko. Ankaŭ kadre de la Monda Jardeko de Kultura Evoluigo, por kiu alvokis Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko, kaj la Tria Speciala Sesio pri Malarmado ĉe UN, kiu okazos venontjare, ni tre ŝatus daŭrigi nian kunlaboron kun UEA. La granda avantaĝo de ĉi tiuj agadoj estas tio, ke ĉiu povas prezenti sian propran starpunkton. Tial ni kredas, ke ili ne atencas la statuton aŭ la limojn de iu ajn organizaĵo. Oni ne ĉeestas por subteni ion preter siaj propraj celoj, sed por prezenti siajn proprajn kredojn, kaj, se tio koncernas nin, eĉ pli por aŭskulti aliajn.

Kredu aŭ ne, kiam ni aŭskultas, ni trovas ke ni samopinias. Por la plimultaj aferoj ni ĉiuj troviĝas ĉe la sama flanko.

Jan Koszmaluk:

Konstrui la pacon sen timi tiklajn demandojn

Junaj homoj preskaŭ de naskiĝo foje havas jarcentajn malŝatojn al aliaj, jen en familia medio, jen en lernejo kie edukado ofte tro foras de objektiveco, jen en preĝejo kie konfesdogmoj estas malegalaj al toleremo, jen en armeo kiu finformas la personecon de juna homo. Jen tiuj kvar faktoroj kreas la junan homon. Kia li/ŝi estas? Ofte kun antaŭjuĝoj, ofte kun certeco pri la senerara sistemo de propraj konvinkoj. Handikapulo, kiu pretas nome de pli superaj idealoj, ne malofte nome de paco, altrudi ĝuste la malpacon.

Kial? Kial tiom da junaj homoj ne kapablas rompi tabulojn, forigi antaŭjuĝojn, serĉi la veron? Mi opinias, ĉar la plimulto restas en siaj medioj, ne havas eblecon interkomunikiĝi, ĉar ĝi ne povas realigi la rajton de senpera komunikado. Ĝuste ĉi tie estas granda rolo de nia movado. Pere de unu sendiskriminacia lingvo plene realigi la rajton je komunikado.

Mi vidis japanojn amikiĝi kun koreoj, mi vidis israelanojn diskuti kun palestinanoj, hindojn kun pakistananoj — ĉion ĉi dum niaj kongresoj per nia lingvo. Mi mem iam spertis malfacilojn sen antaŭjuĝoj diskuti kun germanoj kaj rusoj. Tiam mi komprenis kiom valoras rekta komunikado kaj kiom solvas tio jarcentajn malamikajn tendencojn.

Ne ĉiam estas facile paroli kaj interkompreniĝi, sed ja fari tion estas pli utile ol ĵeti bombojn. La interkompreniĝo inter gejunuloj de la mondo estas la vojo al paco, ĉar tio estas la plej simpla vojo al konfronto de konsciencoj kaj al ilia ŝanĝo, al edukado por la paco. Rekta komunikado inter la ordinara homoj, ordinara gejunuloj kies sincereco ne anstataŭeblas per politikaj direktivoj kaj pragmatisma defendo de lernitaj pozicioj.

La esperantista junularo estas for de okupiĝo nur pri la poresperantaj celoj. Nia movado estas profunde humanisma, sed ankaŭ unika pro la fakto ke ĝi estas relative forta en pluraj landoj kun diverssistemaj registaroj. Tio estas ĝia granda avantaĝo kiun ni, junaj homoj de Universala Esperanto-Asocio penas profunde ekspluati. Konstrui pacon estas ankaŭ okupiĝi pri aferoj kiuj laŭ supra rigardo ne rekte ligiĝas kun pacaktivado, sed ili estas profunde porpacaj, servantaj al ni ĉiuj, al nia interkompreniĝo kaj toleremo. Paco egalas ankaŭ al kondiĉoj en kiuj homoj vivas, tio i.a. estas la rajto libere elekti propran lingvon kaj kultivi propran kulturon. Tro oftas iaspecaj "kaŝitaj" malpacoj — altrudo de fremda lingvo kaj kulturo, ekologiaj problemoj, diskriminacio, malegaleco, alfabeteco kaj aliaj. Ni ne silentas pri tio!

Ni bezonas la lingvon de la junularo

Kiel vi eble vidis en la tagordo, mi venas de Islando kaj portas al vi salutojn de islandaj esperantistoj kaj de kunlabora komitato de islandaj societoj por paco, de kiu mi estas membro, la islanda movado de instruistoj por paco kaj WCOTP, internacia organizaĵo de okcidentlandaj instruistoj. Mia profesio estas instruado, kaj instruado por paco estis dum jaroj al mi tre ŝatinda kaj kara.

Nia temo por tiu ĉi kunveno estas, kiel ni povos plikreskigi komprenon kaj intereson pri laboro por paco. Mi deziras rakonti al vi iomete pri la pac-ondo* en Islando, kiu sukcesis unike bone, danke al la islanda junularo, kiu plimalpli prenis sur sin la plenumon de la entrepreno. Granda grupo de niaj plej popularaj pop-muzikistoj kunigis siajn fortojn, kaj havante la opinion, ke la muziko estas la lingvo, kiun ĉiuj povas kompreni, starigis kunlaboron kun la Simfonia Orkestro de Islando, nacie konataj korusoj kaj la Islanda Opero, kaj kune kun ĉi tiuj priokupis unu el la plej popularaj radiostacioj de Islando ekde la naŭa horo matene ĝis noktomezo. Dum tiu tempo seninterrompe estis elsendata programo pri paco kaj de islanda muziko. Cento da junaj artistoj tie donacis sian laboron en la nomo de la paco, kaj ĉie oni povis aŭskulti la elsendon de la stacio. Populara televid-stacio poste faris pri la sama temo multthoran programon. Je la dekdua en la UN-tago oni sonorigis la preĝejajn sonorilojn ĉie en la lando. Ni partoprenis la internacian sepminutan silenton antaŭ Höfði, la malnova domo, kie siatempe okazis la mondfama kunsido de Reagan kaj Gorbaĉov. Sed kiel mi jam diris, estis la islanda junularo, kiu tiel emfaze atentigis pri la UN-tago kaj la pac-ondo, kiujn oni longe memoros.

* *Temas pri tutmonda simbola iniciato por la UN-Tago por Malarmado (24 oktobro): la agado ĉirkaŭiris la mondon laŭ la horzonoj, tial "onde". En la foto: membroj de Esperanto-klubo "Laro" (Soĉi, Sovetunio) konstruas "Vojon de la Paco" kiel kontribuo al la pac-ondo.*



La gigantaj rokenrol-festivaloj, kiuj okazis antaŭ du jaroj en Novjorko kaj Londono, kaj la televid- kaj vidbend-programoj de tie devenintaj servoj ne nur por kolekti monon por helpi la Trian Mondon pli rapide kaj pli efektive ol oni sukcesis antaŭe, sed ankaŭ vekis milionojn da gejunuloj tra la tuta mondo al pripensemo kaj respondeco rilate al internaciaj aferoj. Dum la pasinta jaro mi kunlaboris en komuna nordlanda esplorado, kaj ni eltrovis kiom grandegaj estas la influoj de la amas-komunikiloj kaj la idoloj de la junularo sur ĝiaj opinioj kaj ĝia tuta vivo.

Edukantoj hodiaŭ staras antaŭ la fakto, ke ili havas la taskon prepari la junulojn por estonteco, pri kiu ni malmulton aŭ nenion scias. Por atingi la junulojn ni bezonas novan pensmanieron, novajn metodojn, iliajn metodojn, ilian lingvon. Ili estas pretaj aŭskulti, ni trovu vojojn por kontakti ilin, por paroli kun ili.

Mark Fettes:

Por nova komunika ordo en la internacia pacmovado

Mi parolas ĉi tie ne unualoke kiel esperantisto, sed kiel iama aktiva pacmovadano, kiu ankoraŭ pasie interesiĝas pri la disvolviĝo kaj estonteco de la internacia pacmovado. Per "internacia pacmovado" mi celas ĉiujn tiujn amasajn organizaĵojn, grandajn kaj malgrandajn grupojn kaj ankaŭ unuopulojn, kiuj dediĉas parton de sia tempo kaj energio al la afero de internacia paco. Temas pro movado treege diversa laŭ ideologio, laŭ organiza strukturo, laŭ prioritatoj kaj difinitaj celoj — kaj ene de ĉiu lando kaj eĉ pli varie inter la diversaj landoj.

Tamen, en ĉiuj lokoj, kie formiĝis en la lastaj jaroj grandaj koalicioj por paco, oni sentas la komunecon de la celoj: redukto de armiloj, politika malstreĉiĝo, reciproka sekureco sen timo, amikeco kaj respekto inter la popoloj. Tiuj celoj, kiel ajn ĝeneralaj ili estas, formas laŭ mi tute klaran politikan programon de la internacia pacmovado, kiu helpas difini ĝin.

En iuj aspektoj, tamen, la termino "internacia pacmovado" povas esti misgvida. Ĝi supozigas ian unuecon, ian organizan strukturon, kiu fakte tute ne ekzistas nek povas ekzisti. Ne nur tio: ankaŭ komunike la diversaj landaj kaj regionaj pacmovadoj nur tre limigite, embrie kuniĝis en internacian reton de kontaktoj. La manko de tiaj kontaktoj povas esti eĉ ŝoka...

Mi volas do skizi por vi mian vizion de "nova komunika ordo" por la pacmovado, ne kvazaŭ sopirata idealo sed io praktika, realigebla kaj fundamente grava por nia longa perspektivo. Kaj mi tuj malkaŝu, ke ĉi tiu vizio estas la produkto de mia kelkara sperto kiel samtempe aktiva pacmovadano kaj partoprenanto en la Esperanto-movado. Ĝis mi spertis la malfermiĝon de landlimoj, kiun ebligas Esperanto, mi mem — kiel multaj — emis malkonscii pri ilia ekzisto. Sed kiam mi al kutimiĝis al la legado de artikoloj, senpere skribitaj de loĝantoj en la koncerna lando; kiam mi spertis la fruktodonivon de interparoloj, kiujn partoprenas homoj el deko da landoj samtempe, senzorge pri lingvaj baroj; kiam mi sentis, kiel funde ŝanĝiĝis miaj bildoj kaj konceptoj pri aliaj landoj pere de Esperanto; tiam mi komencis malkontenti pri la pacmovado kaj demandi min, kial ne eblas ke ankaŭ ĝi estu tia?

Por profiti de siaj potencialaj fortoj de internacia kunlaboro kaj solidareco, la pacmovado bezonas komunikilon egalecan, kiu ne diskriminacias kontraŭ homoj malpli edukitaj, kaj estas alproprigebla eĉ por tiuj aktive

engaĝitaj en socia movado. Ĉiuj aliaj "solvoj" — ĉu la nuntempa uzo de la angla, ĉu la utiligo de interpretistoj, ĉu la rekta ignorado de la problemo — fakte ne estas veraj solvoj, kiel atentigis d-ro Tonkin en sia prelego.

Eventuale vi konsentis kun ĉio ĉi, sed skeptike diras — kiel diris siatempe miaj pacmovadaj kolegoj en Kanado — "Esperanto estas bela ideo, sed niaj celoj tro urĝas, por ke ni lernu ĝin." Kaj efektive, mi nek predikas nek antaŭvidas amasan adopton de Esperanto post tiu ĉi seminario, eĉ de Monda Pac-Konsilio. Sed samtempe mi certas, ke la celoj de Esperanto kaj la bezonoj de la pacmovado estas tro proksimaj por resti longe apartaj. Tio, kion mi ja antaŭvidas, estas la iom-post-ioma proksimiĝo de tiuj du internaciaj movadoj. La esperantistoj, samkiel UEA, pli kaj pli emos aktive diskuti pri la solvendaj mondaj problemoj. Kaj dume, helpate de tio, la pacmovado komencos simili la esperantistojn, kun sia propra reto de internaciaj kontaktoj kaj amikecoj, siaj diversaj internaciaj revuoj, siaj konferencoj, ĉio ĉi pere de Esperanto. Tiel ĝi fariĝos kaj pli efika politika aganto kaj pli trafa modelo de la estonta homa komunumo, kies naskiĝon ĝi celadas.

Marilyn Olsson:

Nova maniero pensi, nova maniero agi

Hodiaŭ estas ekkompreno, ke se ni volas sukcesi en la lukto kontraŭ nukleaj armiloj, ni devas unuigi niajn fortojn kun grupoj, kiuj havas tre malsamajn ideologiajn kaj politikajn bazojn ol tiuj, kun kiuj ni antaŭe kunlaboris. Tiu ĉi estas la komenco de iu ekkompreno, sed ĝi ankoraŭ ne plene evoluis — ĝi estas ankoraŭ en siaj unuaj stadioj kiel intelekta kompreno, sed ne plene evoluinta en la praktiko.

Kio instigis tiun ĉi ŝanĝon? Laŭ mi, temas parte pri la malsukceso de la eŭropa pacmovado, haltigi la "Eŭromisilojn" en 1983, kiu estis decidiga pri ĉi tiu ŝanĝo en la eŭropaj movadoj. La drasta malkresko en partoprenantoj devigis la movadojn rigardi la situacion denove. Potenciale, la sama opozicio ekzistis, eventuale eĉ kreskis pro la fakta lokigo de la misiloj en eŭropaj ĝardenoj. Estis eĉ pli granda nombro de homoj tuŝitaj de la konkretaj negativaj procezoj, kiuj pliigis la militismon de la socio.

La pacmovado antaŭe fokusiĝis ĉe kontraŭstaro. Kontraŭstaro al la misiloj, kontraŭstaro al la sinteno de la registaro, kontraŭstaro al la kresko de militismo. Tiu ĉi "ne"-dira rolo fariĝis speco de kaptilo por la eŭropa movado, el kiu estis malfacile evolui. Novaj aferoj okazis en la socio. En FR Germanio la social-demokratoj perdis la registaran potencon, kaj komencis revizii sian politikon pri akcepto de la Eŭromisiloj. La ekologia movado komencis kreski pli rapide kaj en multaj landoj ekaperis verdulaj partioj, kiuj allogis multajn antaŭajn aktivistojn de la pacmovado. Tiuj lastaj vidis en la verdula movado pli dinamisman forumon por siaj ideoj.



Ne temas nur pri Eŭropo! Esperantistoj marŝas por paco en Vankuvero, Kanado.

Ĝuste kio en la ekologia movado allogis la junularon kaj la aktivistojn el la pacmovado? Mi kredas, ke unu el la allogaĵoj estis la ebleco projekcii siajn esperojn por la estonteco ene de ĉi tiu movado. La homoj ne volis simple diri "ne", ili volis ekdiri "jes". Mi celas, ke ekzistis bezono esti pozitiva, bezono rigardi antaŭen al tiu speco de socio, kiun oni volas krei. Aparte la junularo bezonas pozitivan celon por siaj streboj. Se ni volas, ke la junularo ne retiriĝu de la socio kaj rigardu nur al siaj privataj aferoj, ili devas havi okazon direkti siajn esperojn kaj timojn al pozitiva sinteno pri la estonteco. Estonteco kiu helpas ilin kune konstrui siajn esperojn. La ekologia movado sukcesis proponi ĉi tiun specon de antaŭen-rigarda politiko al multaj homoj, kaj sekve ĝi lastatempe multe kreskis.

Tio reportas min al la "ne"- kaj "jes"-dirantoj. Mi kredas, ke por evoluigi la praktikan kunlaboron kiu necesas por nia pluekzisto sur la tero, ni devas lerni kunigi ĉiujn eblajn fortojn. Ni devas pli emfazi la estontecon, la "jes"-dirantojn de la mondo.

La redakcio bonvenigas viajn reagojn al temoj lanĉitaj en niaj paĝoj. Bv. skribi koncize kaj klare, prefere kun spacoj inter la linioj. Ni rezervas la rajton mallongigi leterojn por aperigo. Spaco malpermesas, ke ni publikigu ĉiujn — sed ĉiuj estas nepre bonvenaj!

Strategiaj celoj por Bjalistoko

Koncerne la proponitan centron en Bjalistoko (*Esperanto* 1987/n-ro 9), mi ŝatus substreki la jenajn aferojn kaj legi la opiniojn de aliaj.

La centro vere apartenu al tutmonda esperantistaro, tiel kiel la lingvo mem apartenas al ĝi, sen divido asocia, nacia, rasa aŭ politika.

Ĝi montru ne nur la evoluon de la lingvo, sed ankaŭ ĝiajn praktikajn eblecojn, per biblioteko, ekspozicioj, koncert-salono, konferencejo k.s. kun samtempa funkciado de Esperanto-aranĝoj, precipe internaciaj.

Ĝi fariĝu centro de komputscienco, aplikado de komputilo ekz. en tradukado k.s., por montri la valoron de la lingvo kaj ĝian taŭgecon por la proksima estonteco.

Se temas pri financaj rimedoj kaj gvidado, ĝi devas esti formita laŭ kooperativa sistemo, apartenanta al ĉiuj Esperanto-instancoj en la mondo, kiuj aĉetos akciojn kaj laŭ iliaj valoroj havos voĉdonrajton en la decidoj pri ĝiaj gvidlinioj. Tamen la loka universitato estu la ĉefa patrona instanco.

Doni la ideojn estas la plej facila tasko, sed realigi ilin povas esti problema. Tamen mi esperas, ke eble mi instigos aliajn partopreni en tiu ĉi diskuto.

Mila v.d. Horst-Kolinska
(Nederlando)

Atenco kontraŭ ekologio

"Historia, impona, tutmonda", "periodo de disvastigo", "jubilea rekordo"... jen nur kelkaj el la titoloj k.s. kiuj rilatis al kvanto en la septembra numero de *Esperanto*. La plene homcentra kulturkompreno de UEA laŭ la ĉie en la mondo regantaj kvantecaj normoj de scienco, tekniko, ekonomio, rapideco, alteco, kresko, povumo efektive instruas nin timi tiun ĉi, nian, movadon.

Kiel diris kolego Tonkin? "La lingvo ekzistas unue por disvastigi, due por ĝui." Esperanto kiel amasa industriprodukto samkiel revolucia bakterio klonita, venkema medika-

mento aŭ neplibonigebla nova amilo. Feliĉigo de la homaro per ĉefe kvanteca progresigo. En la Deklaro de Bjalistoko, UEA fakte sukcesis meti "mediprotektado"-n apud "ekonomia evoluigo". Laŭ ni estas tiel, ke UEA relative senkritike laboras sur la fundamento de potenciale kontraŭviva, ekonomidependa kaj "prosperiga" valorsistemo. Kia koncepto: "neŭtrala" organizaĵo kaj "neŭtrale homa" lingvo difinas kulturon kaj kulturigon sendepende de iu ekologia kontrolinstanco, kvazaŭ ne ekzistus la naturdetru(em)aj efikoj de la kulturo.

Post legado de *Esperanto* 1987/n-ro 9, denove stariĝas la demando: Kian estontecon ni volas? Mi, nome de multaj ekologie konsciaj esperantistoj kaj kiel ankoraŭa ano de UEA, asertas: Mondo, kiu pere de Esperanto eĉ pli perfekte detruigatas estas pli danĝera, timiga kaj evitenda ol mondo sen Esperanto. Kulturo kiel kvanto — ne dankon!

Wolfgang Gunther FR Germanio)

En kuna letero, d-ro Gunther stariĝis la jenajn specifajn kritikojn pri la projekto de bjalistoka centro:

1. *Estas nenecesa atenco kontraŭ la medio konstrui novan centron, kiam ekzistas abundo da taŭgaj malnovaj konstruaĵoj en Pollando.*

2. *La centro situos malcentre, eĉ por poloj, kaj tial estos dekomence malŝparema kaj malegaleca.*

3. *La centro estos vere internacia kaj neŭtrala, nur se oni povos garantii ĝian absolutan sendependecon kaj sencenzurecon.*

4. *La centro minacas disigi kaj disipi la fortojn de la Movado, anstataŭ koncentrigi ilin ĉe jamaj centroj kiel Kultura Centro Esperantista.*

5. *La centro estis akceptita de UEA sen sufiĉe da antaŭa informado kaj diskutado, do nedemokratie.*

Li konkludas: Kie do troviĝas la mankoj en la nuntempa politiko de UEA? Ĉu ĝi eble laŭ strukturo estas nek vere neŭtrala, nek vere ekologia, nek vere paca? Ni lasas la respondon al la gekolegoj en la tuta mondo.

Ni do invitas pliajn reagojn!

Librofoiroj meritas pli da atento

Kial UEA volas fondi bjalistokan centron, kaj por kiu (ĉu por uroj?), kiam samtempe ĝi ne partoprenas en la plej granda aranĝo en la mondo por prezentado de vortoj, nome la internacia Frankfurta Librofoiro? Tiu ĉi aranĝo estas certe malpli kosta, absolute tutmonda, la plej grava kaj alt-nivela ekspoziciejo por iu ajn lingvo. Kial...?

J.S. Skorupski (Berlino)

Antaŭ nelonge furoris en Moskvo la 6a Internacia Ekspozicia Foiro de Libro, kiun atentis kaj salutis UN-estro kaj sovetiaj gvidantoj kaj partoprenis tri mil librofirmaoj el 103 landoj. Ĝian laboron sekvis 700 ĵurnalistoj el 21 landoj.

Lige kun la informo mi havas demandon, ĉu vi scias, ĉu estis prezentita en la ekspozicio literaturo en Esperanto, se ne, do kial? Ĉu estas planata por sekvaj ekspoziciaj foiroj eksponadoj de Esperantaj eldonejoj aŭ simple de la libroj en Esperanto, se ne, do kial?

Cetere: Gazetoj de la mondo informis, ke dum la vizito de Miĥajl Gorbaĉov al Estonio iu demandis pri la sorto de Esperanto en Sovetunio (*Esperanto* 1987/p.111). Tiu anonima demandinto estis Valdemar Kauc, estona esperantisto loĝanta en Tallinn, kiu jam anticipe skribis longan kaj bone argumentitan leteron al la ĝenerala sekretario.

Eŭgeno S. Perevertajlo (Sovetunio)

Red.: Kiel kutime, la respondo al ĉi tiu "kial" estas la jena: ĉar neniuj pensis pri tio aŭ ĉar neniuj estis trovebla por entrepreni/gvidi tian iniciaton. Fakte, ja estis Esperanta librobudo ĉe la frankfurta foiro — tiu de la belga eldonejo-librejo Sonorilo. Tiu eldonejo (por diri sincere) ne estas inter la plej brilaj reprezentantoj de la Esperanta libromarkato; sed ĝi almenaŭ meritas laŭdon pro tio, ke ĝi pretis elspezi tempon kaj monon por prezenti Esperanton en tiu grava internacia medio.

TEJO jubileos en Jugoslavio

Post jubilea jaro, jen ankoraŭ unu festinda jubileo — 50 jaroj de TEJO. Gejunuloj el la tuta mondo festos ĝin en Zagrebo, monde konata Esperanto-centro en Jugoslavio, dum sia 44a Internacia Junulara Kongreso.

Zagrebanoj prizorgos, ke partoprenantoj de la IJK inter la 15a kaj la 22a de julio ĝuu bonegan tempon. Antaŭvida estas tre riĉa programo, pri kaj ekster la temo.

"Komunikado en la 21a jarcento", la kongresa temo, estos pristudata en faka seminario de eminentaj Esperantaj kaj aliaj lingvistoj kaj sociologoj. Praktikan flankon de la temo pristudos ni ĉiuj. Organizitaj estos interna televid-sistemo kun aparte preparita Esperanta programo (ĉu ankaŭ vi havas ion por proponi?) kaj interna komputil-reto ene de la kongresejo. (Komputistoj-esperantistoj, jen via ŝanco, ni serĉas Esperantajn programojn!). Planata estas ankaŭ ekspozicio pri la tekniko de ĉiuspecaj komunikiloj, pri poŝto, televido, lingvo, radio, veturiloj....

Por ke la Kongreso ne estu tro serioza, ni preparis riĉan amuzprogramon. Antaŭvidataj estas du koncertoj, teatra vespero, **multaj** kursoj (dancado, folkloro, sportludoj...)

Grava avantaĝo por ĉi tiu IJK estas tre konvena kongresejo: Srednjoškolski centar. En mezlerneja domo kaj lernejo estos prizorgata ĉio: tranoktado en 4-litaj ĉambroj, manĝado, programo en kinejo kaj klasĉambroj, koncerto kaj sportaj ludoj en parkoj kaj sportejoj. La kongresejo estas kvar aŭtobushaltojn for de la stacidomo, kaj ĝi estas atingebla per **multaj** aŭtobuslinioj.

La kongresa ekskurso kondukos al "Lagoj Plitvice". Tiuj donas **multajn** eblecojn por promeni, boati, naĝi, eĉ perdiĝi inter 16 lagoj kaj en unike konservitaj arbaroj. La lagoj havas la reputacion de la *plej bela* parko en Jugoslavio kaj ĝi troviĝas en la listo de la regionoj protektataj de Unesko.

Kongreskotizoj estas inter 210 kaj 480 nederlandaj guldenoj. Kiel ĉiam, ili dependas de aliĝperiodo kaj aĝkategorio. Aliĝilojn kaj pliajn informojn petu ĉe LKK de la 44a IJK, Amruŝeva 5/1, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

Ankica Jagnjić

Kalendaro

Ĉu via renkontiĝo internacia mankas ĉi tie? Ni povas aperigi nur informojn ricevatajn! **Limdato** por la marta Kalendaro: **15a de februaro**.

Daŭre: Konstanta Internacia Esperanto-Lernejo en Bydgoszcz, Pollando (BET "Esperantotur", str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz)

Kultura Centro Esperantista, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando

Internacia Esperanto-Kursejo (Pisanica), Pf. 791, BG-1090 Sofia, Bulgario

Januaro

03-10: Internaciaj Vintroferioj en Domo Montana, Gsies, Italio (Eki Woite, An der Kirche 33, D-6115 Münster/Darmstadt, FR Germanio)

12-16: 53a Esperanto-Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio, Auckland, Novzelando (LKS, Rita Aagaard, 8 Springwood Place, Balmoral, Auckland 3)

25-30: Esperanto-staĝo, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

30-31: Vintra Amika Renkontiĝo Esperantista, Kubrat, Bulgario (Bulgara Esperantista Asocio, Bul. Ĥristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

30-31: Studa semajnfino, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

Februaro

06-07: Pedagogia studsemajnfino, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

13: 5a Kunveno de Tridekplusuloj, Groningen, Nederlando (5a KTP, Ineke Emmelkamp, Coranthijnestraat 69, NL-9715 RG Groningen)

22-27: Esperanto-staĝo, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

27-28: Studa semajnfino, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

Marto

11-13: Internacia Foira Esperantista Renkontiĝo, Leipzig, Germana DR (Kulturbund der DDR, organiza Komitato de IFER '88, Käthe Kollwitz-Strasse 115, DDR-7010 Leipzig; temo "Homo kaj scienc-teknika revolucio")

15-20: Esperanto-staĝo kaj seminario, "Modernaj pensuloj inter oriento kaj okcidento", Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

21-26: Esperanto-staĝo, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

29-05: 4a Printempa Semajno Internacia, montaro Eifel, FR Germanio (Hedwig Fischer, Gustav-Adolf-Str. 2a, D-4418 Nordwalde)

31-04: HEJS-Tendaro, Monistrol de Monserrat, Hispanio (Hispana Esperantista Junulara Societo, Sol 75, E-41003 Sevilla)

Aprilo

01-04: Brita Kongreso de Esperanto, Bridlington, Britio (A.B. Duerden, 1 Grove House Drive, Bradford BD2 4DS)

01-04: NEJ-Renkontiĝo, Elahuizen, Nederlando (Arjen-Sjoerd de Vries, De Bongerd 8, NL-9801 AS Zuidhorn)

02-04: La montaro Ĵuraso ekprintempe (promenadoj), Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

03-09: Instrumetodoj; Internacia Renkonto de Infanoj, Grésillon, Francio (Esperanto-Domo, Grésillon, F-49150 Baugé)

04-09: 1-a Seminario pri Homaranismaj Esploroj, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre); Intensiva pretiĝo al trapaso de Esperanto-ekzamenoj, KCE (adreso supre)

18-23: Esperanto-staĝo, Kultura Centro Esperantista, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, adreso supre)

27-01: 16a Scienca Interlingvistika Simpozio, Varsovio, Pollando (Akademia Centro Interlingvistika, Ordynacka 9, PL-00-950 Warszawa; temo "Lingvo-komunikado kaj lingvo-planado")

● **Brazilo:** Alagoana Asocio de Esperanto ricevis surprizan viziton en aprilo de itala maristo Paollo Schmüllerman, kiu pasintjare en Roterdamo vizitis la Centran Oficejon de UEA kaj tuj decidis lerni Esperanton. Naŭ monatojn poste, li parolas la lingvon kaj vizitas klubojn en la havenurboj, kie haltas lia ŝipo.

● **Bretonio:** Lastatempe ni ricevis kvarlingvan flugfolion pri la malfaciloj de la bretona lingvo en Francio, kiu enhavas Esperantan tekston apud la hispana, nederlanda kaj bretona. Por informoj skribu al Stourm ar Brezhoneg, 21 straed al Lezioù-Barn, F-56000 Gwened, Francio.


● **Britio:** La renoma biblioteko de la Universitato de Oksfordo — la t.n. Bodleja Biblioteko — organizis ampleksan ekspozicion pri Esperanto por la monatoj oktobro ĝis decembro 1987. La tre detala gvidlibreto pritraktas pozitive multajn aspektojn de la lingvo kaj movado; oni povas diveni en ĝi la influon de d-rino Marjorie Boulton, "sen kiu ĉi tiu ekspozicio ne efektiviĝus".

● **Ĉilio:** Hector Campos Grez antaŭ nelonge sukcese defendis sian tezon "La lingva problemo en internaciaj rilatoj", kiu tiel fariĝis verŝajne la unua fakverko pri Esperanto en Ĉilio.

● **Germana DR:** Laŭ rekomendo de la "Konsilanta Komitato pri Fremdaj Lingvoj" de la Ministerio pri Alt- kaj Faklernejaj Aferoj, ekde 1988 la altlernejoj kaj universitatoj de GDR rajtos nedevige instrui Esperanton, kon-

diĉe ke tion faras kapabla(j) instruisto(j). Laŭ *Saksa kuriero*, nuntempe tio validas por ĉ. 15 institucioj.

La 5an de septembro inaŭguriĝis memortabulo en la urbo Wehlen, kiu surhavas reliefon de Zamenhof kun la vortoj (en la germana): "D-ro L.L. Zamenhof (1859-1917) parolis ĉi tie en 1908 al la partoprenantoj de la 4a Universala Kongreso de Esperanto. Esperanto 1887-1987." Ĉirkaŭ 250 germanaj, ĉeĥaj kaj polaj esperantistoj ĉeestis la ceremonion.



● **Israelo:** La 25an de oktobro Esperanto-Ligo en Israelo aranĝis jubilean solenaĵon en la ĉefa biblioteko de Telavivo, aŭspiciitan de la urbestro. Inter la partoprenantoj estis la vicurbestro Natan Wolloch, universitata profesoro Itamar Even-Zohar, verkisto Aleksander Mausz, kaj parolis la prezidanto de ELI, Josef Murĵan.

● **Jugoslavio:** La urbo Prilep, en Makedonio, meritas ian rekonon kiel reklamejo por Esperanto. Ĝiajn 60 000 loĝantojn privarbas ĉiutage la jenaj objektoj: motelo, dolĉaĵejo, trinkaĵospeco, cigaredomarko, aŭtobuso, florvendejo laŭ la nomo "Esperanto"; okulkliniko, strato, monumento, surstrata mozaiko laŭ "Zamenhof"; la vendejoj "Libero", "Verda Stelo" kaj "Amiko"; kaj diversaj turismaj k.a. informoj en la Internacia Lingvo.

● **Kolombio:** En Varsovio aĉeteblis la unuaj ekzempleroj de ampleksa kasedokurso por hispanlingvanoj, "Unu mondo, unu lingvo", verkita de kolombiano prof. Luis Jorge Santos-Morales. La aŭtoro prelegis pri Esperanto en 10 urboj tra Kolombio, inkl. tri universitatojn — el kiuj du enkondukos Esperanto-kurson venontjare — kaj intervjuiĝis televide. La kuba eldonejo José Martí intertempe kontraktis por la eldono de 5 000 ekzempleroj de la sama metodo. (Vd. "Lasta aperis" en decembro.)

● **Koreio:** Korea Turisma Korporacio (KTP) lastatempe formale agnoskis Esperanton kiel eblan tradukan lingvon por solvi problemojn de turistoj. Ĝi tial nomis 28 esperantistojn en Seulo honoraj interpretistoj, konsulte kun Korea Esperanto-Asocio.

● **Malagasa DR:** Ĉi-jare elektiĝis novaj estraroj de Malagasa Esperanto-Asocio kaj Junulara Esperantista Organizo de Madagaskaro, kaj (sekve?) la du organizaĵoj petas aliĝon al UEA. MEA tiel fariĝus la tria afrika Landa Asocio aliĝinta al UEA, post Sudafriko kaj Zairio.

● **Mongolio:** Ĉ. Dongsuren kaj Ĉ. Luvsanĝav — ambaŭ fakuloj pri lingvoj ĉe la Ŝtata Universitato de Mongolio — antaŭ nelonge fondis Mongolian Esperanto-Unuiĝon sub la Verkista Asocio de Mongola Popola Respubliko. La Unuiĝo okazigas kursojn kaj aktive okupiĝas pri tradukado, i.a. de biografio pri la nacia revolucia heroo Suĥbatar (tradukata de inĝeniero O. Buvei) kaj verkokolekto de D. Nacagdorĝ.

Prelegvojaĝantoj serĉataj

Granda subteno por izolitaj esperantistoj, i.a. tiuj en Afriko, estas la vizito de vojaĝantaj esperantistoj. Se tiaj vizitantoj estas lingve spertaj, ili povas prelegi en la loka klubo, viziti lokajn aŭtoritatojn, ĵurnalistojn ktp aŭ (se ili kompetentas) instrui la lingvon.

Se vi ne jam planas vojaĝon al tiaj landoj, turisme aŭ profesie, nepre konsultu nin anticipe. Faru tion frue, ĉar la poŝto estas malrapida. Se vi ne jam planas vojaĝon, sed volonte tion farus se vi ricevus iom da monhelpo por tio, same skribu al ni. Informu pri viaj kompetentoj pri lingvoscio, E-instruado, profesio kaj spertoj en rilatoj kun ne-esperantistaj medioj. Kiom longe vi povus vojaĝi? Kien prefere? Provizore nia celo estas okcidenta Afriko, precipe.

Reagojn atendas: Hans Bakker, Kastelenstraat 231, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando.

Fake

● **Nederlando:** La FEN-laborgrupo lastatempe eldonis kvar libretojn en la nederlanda, kiuj enhavas praktikajn informojn por lokaj organizantoj de kunvenoj, kursoj, ekspozicioj ktp. Ili senpage haveblas de Esperanto Centrum Nederland en Hago (vd. adreson sub "Instruado").

● **Norvegio:** La norvega Unesko-komisiono lastatempe eldonis informbroŝuron pri la rilatoj inter la Esperanto-movado kaj Unesko. Iniciatis la projekton Norvega Esperanto-Ligo, sed estis la rezolucio de Sofio kaj la persona instiga letero de Unesko-direktoro M'Bow, kiuj konvinkis la komisionon al kunlaboro.

● **Pakistano:** Modesta sed interesa bulteno eldoniĝas ĉiumonate kiel la oficiala organo de Pakistana Esperanto-Asocio, redaktate de Muztar Abbasi, Tarik Umar Ĉohdri kaj M.N. Ĝaved. Ili bonvenigas proponojn pri interŝanĝo kaj abonojn. Skribu al PakEsA, Esperanto Markaz, Pf. 535, Multan, Pakistano.

● **Pollando:** La bjalistoka ĵurnalo *Kurier Podlaski* estas verŝajne la unu-sola gazeto en la mondo, kiu de 1987 ĉiutage informas pri Esperanto. Tamen la aŭtoro de la informoj, S. Dobrowolski, suferas pro manko de materialoj: ĉiuspecaj revuoj ktp bonvenas ĉe *Kurier Podlaski*, ul. Wesolowskiego 4, PL-15000 Bjalistok.

● **Svazilando:** La projekto de Sudafrika Esperanto-Asocio pri kongreso en Svazilando en 1989, al kiu oni invitus esperantistojn el la tuta suda afrika regiono, trovis bonan eĥon ĉe la Ministerio pri Instruado kaj Internaj Aferoj, kiu proponis senpagan kongresejon kaj eldonon de poŝtmarko. Aldone, du artikoloj de Zoltan N. Bogliari aperis en la plej grava landa ĵurnalo, *Swaziland Observer*.

● **Svedio:** La Sveda Instituto, kiu prizorgas i.a. eksterlandajn informojn pri Svedio, presis 8 000 ekzemplerojn de Esperanta informfolio. Ĝi inkluzivas mapeton kaj abundajn informojn geografiajn, sociajn, politikajn ktp. Mendu senkoste ĉe la Instituto, Pk. 7434, S-10391 Stockholm, aŭ ĉe svedaj ambasadejoj kaj konsulejoj, menciante la titolon "Faktoj pri Svedio".

● **Astronomio:** La bulgara urbo Vraca estis gastiganto de internacia Esperanto-seminario pri kosmaj esploroj, la 18an de oktobro. Prelegis fakuloj el Bulgario, GDR, Hispanio kaj Hungario; venontjare BEA eldonos la materialojn el tiu kaj antaŭa konferenco samtema, antaŭmendeblajn ĉe "Esperanto", Pk. 66, BG-3000 Vraca.

● **Ekonomiko:** Aldone al la regula aperado de *Ekonomia bulteno pri Usono*, ekdissendiĝis en julio ties unua *Suplemento*, same verkita de Thomas Goldman. En maniero karakterize klara, li priskribas "la fonon kaj kadron de la plej gravaj evoluoj en la usona ekonomio". Por aboni tiun modelan fakan informilon, skribu al: Interfakto, PO Box 42205, Washington, D.C. 20015, Usono (jarabono: US\$12).

● **Filmo:** La unuan premion en la somera filmfestivalo en Pula, Jugoslavio, gajnis filmo en kiu rolis ankaŭ esperantistoj: *Jam vidita!*, de Goran Marković. Bedaŭrinde, la filmo pre-

zentas Esperanton kaj ĝiajn parolantojn malsimpatie, i.a. per fanatika E-instruisto aktorita de Bogdan Diklić.

● **Homaj rajtoj:** UEA reprezentigis ĉe la Unesko-konferenco pri la instruado de homaj rajtoj, kiu okazis en Malto de la 31a de aŭgusto ĝis la 5a de septembro, pere de d-ro Carmel Mallia.

● **Instruado:** Internacia Esperanto-Instituto, situanta en Hago, Nederlando, ĉi-jare komencis oficialan kunlaboron kun ILEI, publikigis la sepan eldonon de *Baza Cseh-kurso* kaj ekprizorgas Cseh-seminariojn kadre de la ILEI-konferencoj. Pri jamaj kursdiplomitoj kaj la venonta ILEI-konferenco en Kerkrade, skribu al Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag.

● **Interlingvistiko:** Anglalingva studo aperis ĉe la eldonejo John Benjamins (Amsterdamo/Filadelfio), kiu provizas detalan kritikon de la uzo de la angla kiel internacia lingvo. En *Language inequality and distortion*, aŭto-




● **Entomologio:** La 8an de junio 1987, establiĝis en la Nordokcidenta Agrikultura Universitato la unua entomologia muzeo en Ĉinio (foto). Ĝi konsistas el kvin etaĝoj, okupante areon de preskaŭ 2000 kvadrataj metroj. La prezidanto de la muzeo, prof. Io Chou (aŭtoro de *Ĉinio marŝas en insekta mondo*), kaj pluraj aliaj laborantoj regas Esperanton, kiu estas inter la ĉefaj laborlingvoj de la muzeo kaj aperas ankaŭ sur la ekstera muro. La muzeo jam establis interŝanĝrilatojn kun pli ol 700 institucioj en 60 landoj.

ro Yukio Tsuda argumentas ke lingvo "ne estas nur rimedo de komunikado, sed ilo por krei kaj konservi malegalecon inter homoj". Li ankaŭ pledas por atento je la Esperanto-movado ĉe la lasta paĝo, "pro la streboj de la esperantistoj dokumenti grandan nombron da kazoj de lingva malegaleco ĉirkaŭ la mondo".

● **Politiko:** Ĵus aperis traduko de la parolado de la Prezidento de FR Germanio d-ro Richard von Weizsäcker, "okaze de la 40a datreveno de la fino de la milito en Eŭropo kaj de la nazia tiranado", kiun eldonis kaj senpage havigas la Buroo de la Federacia Prezidento (Pressestelle), Kaiser-Friedrich-Str. 16. D-5300 Bonn. La tradukon plenumis Reinhard Haupenthal.

● **Rotario Internacia:** La franca filio de ĉi tiu internacia asocio publikigis bonan dupaĝan artikolon pri Esperanto en la novembra numero de sia revuo, *Le rotarien*. Verkis ĝin ĉefredaktoro kaj esperantisto Marc Levin.

● **Verkistoj:** La 21an de septembro en Zagrebo oni lanĉis la libron *Rande de l'prudento* de fama kroata verkisto Miroslav Krleža, tradukitan de Zlatko Tišljär. Parolis ĉe la lanĉo sekretario de la monda PEN-klubo, d-ro Predag Matvejević, kiu tre favore rilatis al la interkulturaj valoroj de Esperanto. *En la foto: Zlatko Tišljär.*



Persone

● **Ariste:** Festlibro honore al Paul Ariste, la fama finn-ugra lingvisto kaj membro de la Honora Patrona Komitato de UEA, aperis en Tartu, Sovetunio, en 1986. *Fenno-ugristica* entenas i.a. eseon de Aleksandr Duliĉenko (vd. *Esperanto* 1987/p.122) pri la historio de interlingvistiko.

● **Mustea:** Post restado en Haitio, kie li helpis krei lokan Esperantomovadon, kaj dumonata vizito al Dominikana Respubliko, kie li postlasis novan grupon de ok esperantistoj, Eugeniu Mustea nun aktivas en Meksikio. Lia instigado kaj kuraĝigo rezultigis jubilean festkunvenon en Meksikurbo, la 5an de oktobro, al kiu oni invitis reprezentantojn de kulturaj instancoj, ambasadejoj, amaskomunikiloj k.s. Li daŭre prelegas kaj intervjuigas diversloke.

Anoncetoj

Tarifo: Ĉiu vorto kostas unu guldenon (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la aperigo de anoncetoj. Por la tarifo de anoncoj bv. vidi la kolofonon.

Lerneja E-grupo irana serĉas grupkontaktojn eksterlande: p/a Hassan Navid, 5 Daneshvar St., Yakhchal St., Dr Shariati Ave., Tehran.

Ĉina artisto (kiu jam kontribuis belan pentraĵon al la Centra Oficejo) serĉas korespondantojn: Li Ya Min, Xierdaojie 21, Qiqihaer, Ĉinio.

Mi aĉetos Kontaktojn 1/1964, 5/1964, 4/1965, 3-4/1968. Leif Nordstorm, Lilla Nygatan 3B, S-961 32 Boden, Svedio.

La eta juvelo de la finna literaturo, am-romano *La kanto pri fajr-ruĝa floro* de Johannes Linnankoski (E-a eld. 1978) ankoraŭ haveblas de la Libro servo de UEA kontraŭ 17,10 gld.

42-jara viro bonkora, sana, serĉas partnerinon-edzinon. Adreso: Caravello, via Zovenzoni 6, I-34125 Trieste, Italio.

Pri la Tria Mondo kaj ĝiaj problemoj dez. kor. Saeed Ahmad Farani, PO Box 2056, Islamabad, Pakistano.

Por interŝanĝi aŭ alimaniere akiri poŝtmarkojn serĉas kontaktojn Vladimir Bepalov, ab. jaŝ. 913, SU-354000 Soĉi-centro, Sovetunio.

Kongresajn librojn el la UK-oj de 1968-1976 kaj antaŭe serĉas por biblioteko Escuela Argentina de Esperanto, Casilla de Correo 278, RA-2000 Rosario, Argentino.

El Afriko dez. kor. jenaj komencantoj: Gbikpi Kmartin/Johnson Messanh, BP 434, Radio Lomé, Togolando; Batema Maklawo (Kodjo), BP 2006, Lomé, Togolando; Lehoun Baba Noel, BP 1379, Ouagadougou, Burkina Faso; Ouedrago Eudoxie, Ceft, Ouagadougou, Burkina Faso.

Korespondantojn en okcidentaj landoj serĉas s-ino Stanka Dimitrova Georgieva, Str. Car Simeon 243 A/19, BG-1309 Sofia, Bulgario.

Irana e-isto dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, precipe pri sportoj; interŝanĝi kaj kolekti pm. Sendas iranajn pm kontraŭ irk-oj. S-ro Farzin Taghavi Gilani, no. 25, Asadi 36 St. Kuhsangi, 91756 Meshad, Irano.

SUBTENU ARĈE

ARĈE estas Amika Rondo por Ĉinaj Esperantistoj, fondita post la UK en Pekino kiel reago al la amikeco kaj entuziasmo de la ĉinoj por Esperanto. **ARĈE** celas sendi librojn, trovi kontakthomojn (fakajn kolegojn, samhoobiulojn), konsili pri lingvaj problemoj, ĝenerale etendi amikan manon ne kvazaŭ superece sed por ke ni lernu el la riĉa ĉina kulturo kaj ĝin komprenu kaj estimu.

ARĈE kaj la ĉinaj esperantistoj estos dankaj al ĉiu bonanimulo, kiu volas kontribui per iom da mono al nia UEA-konto arce-k.

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bv. sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27 (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.

11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).

11.00-11.30 Pekino, 43.13m (6955 kHz), 31.64m (9480 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.

13.00-13.30 Pekino, 25.75m (11650 kHz), 19.50m (15385 kHz).

15.30-15.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).

21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).

22.30-23.00 Pekino, 31.15m (9630 kHz), 26.05m (11515 kHz).

LUNDE

17.30-17.40 Berno, 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

MERKREDE

01.15-01.25 Berno, 50.29m (5965 kHz), 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

03.15-03.25 Berno, 48.90m (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz).

07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 30.35m (9885 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

10.45-10.55 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.14m (11935 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz).

13.15-13.25 Berno, 25.65m (11695 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.82m (15135 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

15.15-15.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 19.44m (15430 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.83m (21695 kHz).

17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 19.44m (15430 kHz), 19.32m (15525 kHz), 16.83m (17830 kHz).

22.15-22.25 Berno, 50.29m (5965 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.16m (11925 kHz), 24.93m (12035 kHz).

ĴAŬDE

06.00-06.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

21.25-21.30 Tallinn, 290m (1034 kHz), 49.30m (6085 kHz). Nur la unuan kaj trian ĵaŭdojn de la monato. Eesti Raadio, Esperanto-fako, SU-200100 Tallinn, Estonio, Sovet-Unio.

SABATE

17.30-17.40 Berno, kiel lunde.

20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 41.15m (7290 kHz), 30.90 (9710 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.

Berno, kiel merkrede.

DIMANĈE

05.30-05.45 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 19.47m (15410 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.

09.25-09.30 Tallinn, kiel la antaŭa ĵaŭdo.

09.30-09.45 Vieno, 48.74m (6155 kHz), 25.18m (11915 kHz), 19.47m (15410 kHz).

09.50-10.00 Budapeŝto, M.F. 67.04 MHz, 67.97 MHz, 68.24 MHz, 68.36 MHz, 68.48 MHz, 68.72 MHz, 69.38 MHz, 70.10 MHz, 70.43 MHz, 70.64 MHz, 72.08 MHz. Programo preparita de Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

20.00-20.10 Vatikano, 570m (526 kHz), 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.01m (6248 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj MF 93.3 MHz, 96.3 MHz, 105.0 MHz. (ankaŭ je festotagoj).

22.45-23.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.

DIREKTITAJ ONDOJ

Berno: je la 01.15h al la Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.15h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45h kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Proksima Oriento kaj Azio; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15h al Arabio kaj Afriko; je la 22.15h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 1530, 9625, 11700 kaj 15120 kHz je la 20.00h al Afriko. **Vieno**: 15410 kHz al Proksima Oriento.

SEZONA HORŜANĜO

Ekde la 27a de marto 1988 la elsendoj el Berno (nur la eŭropa programo je 17.30h), Budapeŝto, Tallinn, Vatikano, Zagrebo estas aŭskulteblaj horon pli frue laŭ UTC.

ALIAJ STACIOJ

(urba aŭ regiona aŭdebleco; horoj laŭ loka tempo)

Brazilo: Sorocaba (ZYK669), 1080 kHz, vendrede, 21.00-22.00h; **Rio de Janeiro** (ZYJ462), 1400 kHz, dimanĉe, 19.30-19.45h (Brazila Spiritisma Federacio).

Hispanujo: Kordovo, 94.3 MHz, sabate, 12.00-12.20h (Radio Libera Lupeo).

ESPERANTLINGVAJ ELSENDOJ DUM LA JARO 1987

				Nombroj	Horoj
Aŭstrujo	Wien	(15 × 2 =)	30 min ĉ.sem.	104	26.
Brazilo	Rio de Janeiro		15 min ĉ.sem.	52	13.
	Sorocaba		60 min ĉ.sem.	52	52.
Ĉinujo	Beijing	(30 × 4 =)	120 min ĉ.tage	1460	730.
Hungarujo	Budapest		10 min ĉ.sem.	52	8.40
Italujo	Roma		20 min ĉ.sem.	52	17.20
	Verona	(10 × 2 =)	20 min ĉ.sem.	104	17.20
Jugoslavio	Zagreb		15 min ĉ.sem.	52	13.
Pollando	Warszawa	(25 × 4 + 30 × 2 =)	160 min ĉ. tage	2196	976.
Svislando	Bern	(10 × 19 =)	190 min ĉ.sem.	988	164.40
Vatikano	Radiovaticana	(10 + 15 =)	25 min ĉ.sem.	104	21.40

Entute por la jaro 1987: **5216** elsendoj per **11** stacioj dum **2040** horoj.

Aŭskultu kaj reagu!

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, n-ro 1/1985)

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

CH-2301 LA CHAUX-DE-FONDS (Svislando)

atendas vin la tutan jaron. Agrabla esperanto-vivo, bonaj manĝoj, komfortaj ĉambroj, sana vivo en la montaro.

La venontaj esperanto-staĝoj por komencantoj kaj progresantoj okazos la ĉi-sekvajn semajnojn: 25-30 januaro 1988, 15-20 kaj 22-27 februaro, 21-26 marto, 18-23 aprilo, 23-28 majo, ktp.

Aliaj aranĝoj: 15-20 februaro 1988: Modernaj pensuloj inter oriento kaj okcidento. Instruos Eugène De Zilah. 20-22 februaro: Bahaa renkontiĝo. 2-4 aprilo (pasko) La montaro Juraso ekprintempe: piedmigrado. 4-9 aprilo: Intensiva pretiĝo al trapaso de esperanto-ekzamenoj. 4-9 aprilo: Ĉu eblas societo sen leĝoj? Seminario pri homaranismaj esploroj. Instruos François Degoul. 21-23 majo (pentekosto) 2-a studa semajnfino pri arbaro (en arbaro kun arbaristo). Instruos Johann Pachter. Petu la detalan informilon.

La vualo de l' tempo


de J.H. Sullivan (1913)

Dudek originalaj noveloj, en kiuj "rolas la propra stilo de Sullivan, kiu sukcesis esprimi sin per ekvilibre riĉa, klara kaj flua lingvaĵo,... sed la plej trompa trajto estas la fino de ĉiu novelo...: vi neniam trovos..."

George Camacho


Eld. TK/Stafeto, 1985. 116p. 22cm. ISBN 90 6336 028 2. Prezo: 19,50 gld. Rabato de unu triono por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj, plus sendokostoj. Mendu de la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

TRI ESPERANTO-LIBROJ EL KUBO



La historio absolvos min, Fidel Castro. José Martí, 1984. 62p. Prezo: 6,00 gld.

En 1953, kortumo en Havano kondamnis Fidel Castro je 15 jaroj de mallibero pro revolucia agado. Mem juristo, Castro defendis sin per ĉi tiu fajra parolado, kiu fariĝis kvazaŭ programo de la kuba revolucio, venkonta 6 jarojn poste.



Kuba ŝtata organizo, Domingo García Cárdenas. José Martí, 1985. 146p. 7,50 gld.

Jen densa, detala priskribo de la transformo de Kubo en socialisman ŝtaton post la revolucio en 1959. La libro prezentas la faktojn "sincere sen belaj vortoj por amikiĝi ĉie ajn" (Werner Bormann, *Esperanto* 1987/p.201).



La lasta virino, Manuel Cofino. El la hispana trad. Arnoldo Aguila Miguel. José Martí, 1986. 188p. Prezo: 9,00 gld.

Temas pri unu el la plej famaj romanoj el Kubo, kiu jam aperis en 29 eldonoj en 17 landoj. En 1971 ĝi gajnis la Premion Domo de Amerikoj. Per noveca strukturo kaj poezia vortpentrado, la romano tre vigle rakontas pri amo kaj konflikto kadre de la konstruado de nova sociordo.

Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Aldonu 10% por sendokostoj. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

**Piaf kantas
en Esperanto!**

Ŝi furoris en Pekino kaj ravis en Varsovio. Nun vi povas ĝui la artiston de Joëlle Rabu sur 60-minuta sondisko aŭ kasedo. "Passport" inkluzivas kantojn en la angla, franca kaj Esperanto, kun plenaj tekstoj.

*Passport
Joëlle Rabu*

Ankoraŭ haveblas (6"-disko):

Omaĝo al Veselin Damjanov

Mendu de la Libroservo de UEA. Passport (kasedo aŭ disko): 31,20 gld.; Omaĝo: 6,00 gld. 1/6-a rabato por minimume 3 ekz.

el la seminario organizita de UEA ĉe Unesko (1985):

**PLURILINGUISME
ET COMMUNICATION**

red. F. Lo Jacomo

Studadon de komunikado oni ne limigu al studado de teknologiaj iloj por diskonigi informojn: jen la ĉeftemo de la 24 aŭtoroj de ĉi tiu verko. kies tekstoj prilumas unuflanke la riĉan kontribuon de lingva diverseco al la homa heredaĵo, aliflanke la gravecon kaj aktualecon de la tiufontaj komunikaj problemoj. 80% franclingva, 20% anglalingva.

Plurlinguisme et communication, red. F. Lo Jacomo. Paris: SELAF, 1986. 330p. 24cm. ISBN 2 85297 194 1. Prezo: 57,00 gld.

**Bjalistoka Jubilea Medalo
el bronzo * 10,5 cm * 341 gr.**



Unuflanke, reliefa portreto de Zamenhof; aliflanke, Jubilea desegnaĵo kaj teksto.

Mendu de la Libroservo de UEA (36,00 gld. plus sendokostoj — minimume 5 gld., alikaze 10%; 1/6-a rabato por tri aŭ pli da ekz.).

KOREAJ ESEOJ

NOVELOJ KAJ POPOLRAKONTOJ

1932-1967

TRADUKIS HAJPIN LI

222p. 15x22cm. *Mendu ĉe la Libroservo de UEA:* 12,90 gld. plus sendokostoj.

UEA serĉas organizanton-administranton por siaj Universalaj Kongresoj.

**Konstanta
Kongresa Sekretario**

Funkcioj: Inkluzivas buĝetadon kaj librotenadon, redaktadon de kongresaj eldonaĵoj, laborkunordigadon kaj korespondadon. KKS kunlaboras kun Loka Kongresa Komitato kaj respondecas pri kongresa politiko al la Estraro de UEA.

Kvalifiko: Studoj pri ekonomiko, sociologio aŭ manaĝeraj sciencoj estas bonvenaj. Necesas flua, bonnivela rego de Esperanto; kono de aliaj lingvoj estas tre dezirinda. Kandidato devas posedi kelkjaran sperton kiel aktiva esperantisto, organizan kaj mastruman talenton, kapablon kunordigi grupan laboron, agrablan kaj firman karakteron, facilon kontakti homojn kaj harmonie kunlabori kun ili, entuziasmon kaj iniciatemon. La posteno aparte taŭgas por persono inter 25 kaj 35 jaroj, prefere ne edz(in)iĝinta.

Sendu kandidatiĝojn aŭ eventualajn informpetojn al la Centra Oficejo en Roterdamo, Nederlando.

**ĈU LA HOMARO TRAVIVOS
LA NUKLEAN EPOKON?**

Legu **LA RESPONDON DE DIO**. Petu la senpagan libreton de Internacia Biblia Misio, 29 Plantation Road, Poole BH17 7LN, Britio.

**STUDOJ PRI LA INTERNACIA LINGVO
Etudes sur la langue internationale
Studies on international Language**

Michel Duc Goninaz (ed.)

Université de Provence à
Aix-en-Provence
En collaboration avec
la Universala Esperanto-Asocio

J. Leyk, La Esperanta socio fronte al la ekstera medio; U. Lins, Marxismus und internationale Sprache; D.L. Gold, N.Z. Maimon's La kaŝita vivo de Zamenhof; R.E. Wood, The Development of Standard Phonology in Esperanto; P. Janton, Latentaj strukturaj trajtoj de la Esperanta gramatiko; R. Rokicki, Leksemstrukturaj aspektoj klasifiki la Esperantan morfemaron; I. Szerdahelyi, Principoj de Esperanta etimologio; M. Duc Goninaz, Problemes sémantiques et sociolinguistiques dans l'usage de l'espéranto; C. Piron, Créativité et expression linguistique.

Mendu de la Libroservo de UEA: 39,00 gld. plus sendokostoj, 1/3-rabato por minimume 3 ekz.

Gent
AIMAV
1987